

# BEOGRADA VERDA ESTU NI HOMOJ SITULO

Jaro IV

Beogrado, septembro-decembro 2009

n-ro 3(10)

## ESTU NI HOMOJ PATRIARKO SERBA PAVLO (1914-2009)

”Foriris la plej bona inter ni. Ĝuste nun multaj vere komprenas pri kia homa grandeco temas.”

Super nia ĉefurbo Beograd resonadas sonoriloj de ĉiuj ĝiaj temploj, miloj da homoj en solena trankvilo atendas en kilometra vico la lastan fojon kisi la manon de forpasinta serba patriarko. De tiu ĉi mondo li retiriĝis sen iu ajn superflua vorto, same kiel li vivis. Li diris: “Kiam la homo naskiĝas, li ploras kaj ĉiuj ĝojas, kiam li mortis la tuta mondo ploras, nur li ĝojas. *La popola juĝo de l’amo* jam de longe lin konsideras sanktulo, la paŝisto kiu per la tuta sia estaĵo atestas Kriston.

En sia unika libro *Estu ni homoj* li lasis multajn proverbajn opiniojn, ekzemple:

- Gardu ni nin mem de malhomoj, sed plue ni zorgu ke ankaŭ ni ne estiĝu malhomoj.
- Kiom da ni estas malproksime de dio, tiom da ni estas pli malproksime de aliaj homoj.
- Estu ni homoj, infanoj de dio, kaj fidu ni la justecon pli ol nian koleron...

Al ĉiu li parolis ĉion pri la dio kaj ĉion pri la homo, ĉion pri la ĉielo kaj la tero. Sed tiel por ke ĉiu povus preni vere tiom kiom li kapablas porti. Nek pajlereton pli.

*Sinjoro dio de ni ne atendas pli ol ni povas, sed nek malpli.*

D-ro M. Stojanović

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado  
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumento  
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),  
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko  
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)  
Aperas trifoje jare

---

**Ĉefredaktoro:** d-ro Miodrag Stojanović,  
**Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa  
Eremija, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica  
Stoiljković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić,  
Velibor Simović, Milan Olbina,  
**Teknika redakto:** Adem Jakupović

# Originala prozo

## RIMARKO

Originala rakonto sendita al la Juĝanta Komitato de la internacia literatura konkurso 1896 kaj honorita per arĝenta ĵetono.

*En la informilo de Internacia Esperanta muzeo (IEM) el Vieno, n-ro 158, denove, kiel speciala numero, aperis libreto M. Abesgus: KRALJEVIĈ MARKO, tri originalaj rakontoj el la jaro 1896. Ni kredas ke rakontoj estas interesaj por niaj legantoj. En Antaŭparolo, interalie, pri rakontoj oni diris:*

"La originala rakonto "Kraljeviĉ Marko" de M. Abesgus pritraktas temon, kiu multe okupis la esperanlistojn de la unuaj jaroj: la antagonismo inter nacia sento kaj la kosmopoliteco de Esperanto. Fakte tiutempe naciismo ankoraŭ ne miskreditiĝis; por ceteraj etnoj ĝi estis fakte esenca en la akiro aŭ la konservo de sia identeco."

Vieno, 1991 04 30 Herbert Mayer

La "Enciklopedio de Esperanto" (Budapeŝto, 1933) raportas sur paĝo 13 jene pri la aŭtoro: "Abesgus M., ruso, bankoficisto, komence en Baku, poste en Teheran, kie li estis unua pioniro de E. Al lia plumo apartenas belaj originalaj skizoj pri Baku en "LI" [Lingvo Internacia] kaj originala rakonto "Kraljeviĉ Marko" premiita en la literatura konkurso de 1896."

*Kun permeso s-ro Mayer, donita al s-no Tereza Kapista, ni finas la rakonton en ĉi tiu numero.*

## KRALJEVIĈ MARKO (3)

Silente ni iris laŭlonge [de] la kruta mallarga strato, kaj mia koro estis ŝargita. Malfeliĉa kantisto! kien kondukos vin la malfeliĉa okazo de via nomo, kiu tiel forte frapis vian ekzaltitan cerbon? Ĉu ne forbruligos vin la bruletanta en vi flamo de frenezeco?

\* \* \*

Estis la fino de februaro, kaj ĉie sentiĝis ventumo de l'venanta printempo: jam neĝo estis nenie vidata; la glacio, kaptadinta Savon kaj Danubon, forfluis, liberiginte de siaj katenoj du aŭ tri vaporŝipojn kaj kelkajn trenŝipojn, ĉirkaŭtenitajn de ĝi apud Beogrado; post kelkaj tagoj devis foriri unuafoje la vaporŝipo malsupren laŭlonge [de] la Danubo, kaj mi intencis per ĝi forlasi la ĉefurbon de Serbujo. Tiun ĉi matenon mi tute dediĉis al la rea ĉirkaŭrigardo de 1'fortikaĵo, kaj nun mi sidis sur benko en parko "Kalimegdano", kiu ĉirkaŭas la fortikaĵon, – sur alta monto super la Savo mem, kaj la printempa bloveto ventumadis min per sia afabla spirado. De malsupro estis aŭdataj sonoj de haveno, vekiĝanta al somera agado. Nelarĝa, sed multakva Savo sub miaj piedoj kunfluis sin [= kunfluis] kun la potenca Danubo, kaj ankoraŭ dum longe la rigardo povis observi la fluon de ĝiaj klaraj akvoj differenceblaj de la flavetaj akvoj de Danubo. – Dekstre estis vidataj ambaŭ partoj de 1'fortikaĵo: la malsupra, kies muroj sin levas rekte el la akvoj de l'kunfluantaj Savo kaj Danubo, kaj la supra – sur la monto; melankolia sento, demando: "por kio tio ĉi ĉio estis bezonata, kaj por kio ĝi estas bezonata nun" naskiĝas

en la animo, kiam oni rigardas tiun ĉi aron de [= da] konstruaĵoj kaj muroj, de kiuj nur nemultaj estas loĝataj (de soldatoj aŭ punlaboristoj); tie ĉi ekzistas muroj kaj profunda, ĉirkaŭmetita per brikoj puto, en kiun oni sin mallevas per ŝraubaj brikaĵoj ŝtuparoj - restaĵoj de tempoj de romanoj [= romianoj]; tie ĉi interne sur ia pordego oni vidas surskribon: "Justinianus Imperator...", kaj supre – la surkonstruaĵo estas de klarturka stilo, kiel ankaŭ la ŝvitbanejo kaj multaj aliaj konstruaĵoj; sur unu pordego estas elhakita insigno de glora aŭstra militestro princo Eŭgenio Savoja. Tiuj ĉi muroj vidis multajn batalojn kaj mortojn ĝis la atakmilito kontraŭ ili en la jaro 1806 per Karagorge\*. <\*Kara (nigra) Georgio – la unua serba vasala princo.> Sed nun ili perdis ilian [= sian] militan signifon, kaj antikvaj fanda[-]feraj pafitegoj, forlasitaj kaŭze ilia maltaŭgeco, pace rustas sur la detruigantaj muroj, super difektitaj, larĝaj kaj profundaj fortikaĵkavoj, ĉirkaŭmetitaj per brikoj. – El la bluanta malproksimo – antaŭe – pelas siajn flavetajn akvojn la potenca Danubo, larĝege disverŝiganta sur la Slavonia ebenaĵo; sur alia bordo de Savo – jam en Aŭstro-Hungarujo – kuŝas la urbeto Zemlin; dekstre – sur la Danubo kuŝas Panĉova; estas ankoraŭ vidataj kelkaj vilaĝoj... La ĉirkaŭvido de tie ĉi estas belega; oni diras, ke en klara vetero de tie ĉi estas videbla la tuta Slavonia ebenaĵo ĝis la sankta ĉe serboj monto Fruŝka (tie en monahejo ripozas mortkorpo de caro Lazar), – ĝis la blankaj turoj de Petervardejn.

– Bonan tagon, sinjoro! eksonis subite apud mi. – Mi returnrigardis. Tio estis nia malnova konato, Marko Kraljeviĉ, kun "gusle" en siaj manoj. Li ŝanĝiĝis malmulte; tio ĉi estis tiu sama maldika gracia talio, tiuj samaj delikataj kaj noblaj trajtoj, tiu sama flamo de la grizaj okuloj; sed krom, ke en la okuloj de lia vizaĝo bruletis ankoraŭ flamo – du mallumruĝaj makuloj sur la vangostoj, – kaj mia koro estis kunpremita de kompato je la entuziasto, kiu en flugoj de sia ekscitita penso, eble, mem ne konsciis sian malsanon.

[–] Nu, kio, sinjoro, ĉu vi rigardas la landojn de la hungara reĝo? ekparolis Marko kun febra viviĝeco, – sed ja ĉirkaŭe, – kiom vidas la okulo – loĝas ankaŭ serboj; sur la dekstra bordo de Danubo – en Slavonio, kiel *ili* ĝin nomas – oni leĝigas almenaŭ la serban lingvon; dume sur la maldekstra, kiun ili rilatigas al Hungarujo, oni ne faras eĉ tion!... Jes, sinjoro, ekzistas ankoraŭ efikado por Kraljeviĉ Marko, kiam li venos; kaj li venos kaj kreos al ni grandan serban regnon; vi parolu, sinjoro, kion vi volas, sed antaŭ ol homoj unuiĝos en homaro, kiel fratoj, ili devas; esti unuiĝotaj en sia nacio!

Li eksilentis kaj enpense rigardis malproksimen.

– La sinjoro estis tutatempe en Beogrado? estos ankoraŭ dum longe?

– Ne, mi forveturos post kelkaj tagoj.

– Kiel estas tio, kion vi, sinjoro, diris el Jesajo? ripetu al mi, se estas ebla.

Mi plenumis lian peton.

Responde je tio li subite eksidiĝis sur benkon apud mi, ekkondukis kelkfoje la arĉon sur la "gusle" kaj – ekkantis. Tio ĉi estis kanto simila per ĝiaj versoj je versaĵoj de serba eposo; tia sama deksilaba verso kun cesuro [=cezuro] post la kvara silabo; tiaj samaj turnoj de parolo kaj analogioj. En la komenco tio ĉi estis tia sama kanto pri Kraljeviĉ Marko, lia atendata vekiĝo kaj metataj sur lin esperoj; sed poste la kantisto subite faris kuraĝan turnon: li jesis, ke Kraljeviĉ Marko liberigos en la komenco sian nacion kaj poste unuigos en frata amo la tutan homaron por tio, ke estu plenumota la antikva profetaĵo: Kaj oni reforĝos el glavoj plugilojn kaj el ponardegoj rikoltilojn; ne levos glavon nacio kontraŭ nacio kaj oni ne lernos pli militi.

Mia kantisto estis, sekve, ankoraŭ poeto, eble – ankaŭ improvizi[i]sto per helpo de la fleksebla kaj bonsona serba lingvo. Miaj vortoj, diritaj al li tiam en la kafejo, videble, frapis lin profunde; liaj idealoj kaj celoj fariĝis pli larĝaj, sed ankaŭ por tiuj ĉi celoj li estis konvikita de la neceso de vekiĝo kaj veno de lia Kraljeviĉ Marko.

La makuloj sur siaj vangoj pliheliĝis. Li profunde eksopiris, sin levis de sia loko kaj rapide foriris, dirinte pli nenian vorton, nek eĉ "adiaŭ", nek returninte sin eĉ unufoje.

\* \* \*

Kie vi estas nun. Marko Kraljeviĉ? Ĉu radikigis en vi la kreskadinta en vi semo de frenezeco, kaj vi nun jam sen ŝanceloj pensas, ke vi estas ne sole nome tiu Kraljeviĉ Marko, kiu liberigos kaj unuigos vian nacion? au – kaj tio ĉi estas pli kredebla – vi, kiel la heroo de la legendo, dormas nun sub la tero, kaj tiu ĉi dormo estas por vi eterna dormo? via mortema korpo ripozas sub modesta ŝtono de ia trankvila tombejo de la jam libera Ŝumadia? via cerbo (kiun ni, homoj de ora mezo, homoj de amaso, ne povas ne opinii malnormala) kaj via multesuferinta koro eniris jam en la rondoturnon de 1' ŝtofo [= materio], kaj la vivigadinta ilin malmortema animo revenis al ĝia unuafonto, al la Granda Spirito de 1'universo?

### **Lingva komento**

Kelkaj ĝeneralaj trajtoj de la frua Esperanto:

- uzo de la tabelvortoj je -a anstataŭ de tiuj je -u,
  - pli ofta uzo de kelkaj sufiksoj (-ad-, -ec-),
  - abundo de "ĉi",
  - pli ofta uzo de akuzativo sen prepozicioj por indiki direkton.
  - Participaj substantivoj povas havi objekton ("la aŭskultintoj la kantiston")
  - Origine transitivaj verboj pluformitaj per -ig- povas gardi la transitivecon: sciigi vian nomon = igi scianta vian nomon.
- Vortklarigo: saligaĵo – en salo konservita manĝaĵo.

## КАКО САМ ПОСТАО ЛОПОВ

Згражавам се над свим лоповима, али ...

Био сам неком приликом у групи, етнички измешаној, која је шетала међу њивама где је растао зелен кукуруз. Кад је неко, између нас, предложио да крадемо кукуруз – да печемо, успротивио сам се, али је већина ипак – крала.

Нешто касније – ја сам отишао негде.

Кад сам се вратио – они су већ испекли и појели кукуруз, али су оставили једно парче – за мене. Одмах сам разумео значење тог парчета. Ако бих га појео – онда признајем да сам учесник у заједничкој радњи. Ако не будем хтео да једем ...

Ипак сам јео.

Замислите – колико сам срећан што нисам био у групи која чини суров злочин!

У такозваној транзицији – влада је основала министарство за приватизацију. Оно се стара о распродаји свега што је друштвена имовина народа. Другим речима – стара се о масовној крађи где неки грађани (радници) имају право да добију „бесплатне“ акције, неки грађани, који су имали право да станују у друштвеним становима онда су имали право да „купе“ оне станове скоро џабе док су неки „куповали“ фабрике. Велика маса је остварила „своје“ право, али, много већа маса – ништа. Сви грађани, који нису добили ништа, имају право – да то траже и они су тражили. Они ће некад да добију нешто или, вероватније – ништа, али су се сви учланили у масу лопова. Разуме се – главне личности већ су присвојиле највећи део друштвеног богатства, али они „нису“ лопови, јер су „платили“ оно што су узели.

**Ја сам, такође – тражио!**

Никоме ни на памет не пада да овде истерује правду из ове масовне узурпације, али се, зато – воде врло опсежне акције око доношења закона о реституцији – враћању национализоване и конфисковане имовине која је, већим делом била предмет неке раније узурпације, о којој су нестали материјални докази, али остали – наследници.

Велибор Симовић

## KIEL MI FARIĜIS ŜTELISTO

Mi abomenas ĉiujn ŝtelistojn, sed ...

Iam mi estis en la grupo, etne miksitaj, kiu promenis inter terkampoj kie kreskis jam ne tute matura maizo. Kiam iu persono, inter ni, proponis ke ni ŝtelu maizon – por baki, mi rezistis, sed plimulto el la grupo tamen – ŝtelis.

Iom poste – mi foriris ien.

Kiam mi revenis – ili jam bakis kaj formanĝis tutan kvanton de la maizo, sed ili lasis unu pecon – por mi. Mi komprenis la signifon de tiu peco. Se mi manĝus ĝin – tiam mi agnoskus ke mi estas partoprenanto de komuna ago. Se mi ne volus manĝi ...

Mi, tamen – manĝis.

Imagu – kiom mi estas feliĉa ĉar mi ne estis en grupo kiu faras iun kruelan malicagon!

En tielnomata tranzicio – la registaro fondis eĉ ministerion por privatigo. Ĝi zorgas pri disvendo de ĉio kio estas komuna posedo de la popolo. Alivorte – ĝi zorgas pri amasa ŝtelado kie iuj civitanoj (laboristoj) rajtas ricevi „senpagajn“ akciojn, iuj civitanoj, kiuj havis rajton loĝi en komunaj loĝejoj tiam rajtis „aĉeti“ tiujn loĝejojn preskaŭ senpage dum iuj „aĉetis“ fabrikojn. Granda amaso efektivigis „siajn“ rajtojn, sed, multe pli granda amaso efektivigis – nenion. Ĉiuj civitanoj, kiuj ricevis nenion, havas rajton – postuli tion kaj ili postulis. Ili iam ricevos ion aŭ, pli probable – nenion, sed ĉiuj aniĝis en la amason de ŝtelistoj. Kompreneble – ĉefaj personoj jam alpropriigis la plej grandan parton de komuna riĉo, sed ili „ne estas“ ŝtelistoj, ĉar ili „pagis“ tion – kion ili prenis.

### **Mi ankaŭ – postulis!**

Neniu venis al ideo, ĉi tie igi la juston pri ĉi tiu amasa uzurpado, sed oni, tial – gvidas ampleksajn agojn pri inaŭguro de la leĝo pri t.n. restitucio – redono de nacionalizita kaj konfiskita posedaĵo kiu, plimulte estis la objekto de iu iama uzurpado, pri kiu malaperis leĝaj pruvoj, sed restis – heredantoj.

Velibor Simović

## Karnavalo en Brazilo: **NE ESTAS ĈIO ORO...**

Kiu ne konas la grandan spektaklon, faman atrakcion en Brazilo? Sed ĉu ĉiuj havas la ĝustan informon pri ĝi aŭ havas nur informojn kiujn la TV montras?

Mi vizitis plimalgrandan urbon en Brazilo TR kie akceptis min la loka radioelsendo kaj faris programon pri Esperanto. Mi ŝatas tiujn elsendojn ĉar utilas por propagandi Esperanton. Poste mi kun akompanantoj estis akceptataj ĉe urbestro. Kiel ĉie ĉe oficejoj de funkciuloj oni devas iom pli longe atendi. Same ĉi tie. Dum atentado la ĵurnalistino kiu estis kun ni, helpe de lokaj esperantistoj, rakontis al mi, pli ĝuste fanfaronis, ke ŝi ĉi jare partoprenos Karnavalon. Ŝiaj okuloj briletis kaj kun larĝa rideto pri tio parolis. Ŝi jam ne estis tro juna kaj bela tute ne. Malaltstatura, iom diketa kun larĝaj ŝultroj. Mi kun miro komparis ŝin kun la bildoj kiujn mi vidis en TV pri belegaj, altaj sveltaj bronzkoloraj belulinoj. Sed mi nenion demandis.

Ŝi certe vidis miron sur mia vizaĝo kaj rapide klarigis: la fraŭlino kiu ĉeestas karnevalon multe pli valoras ol tiu kiu neniam partoprenis la defileon?! Tio estas iuspeca doto kion ni donas en Eŭropo. Do, enirbileto al baldaŭa fianĉiĝo. Ŝi tre kontente akcentis ke ŝi jam enpagis 1000 dolarojn, kiel devigan sumon, al ĉiuj partoprenantoj. Mi vere ne komprenas kial tiu grandega sumo? Do, ŝi klarigis ke en Brazilo ekzistas 12 grandegaj kaj famaj sambolernejoj, kaj multaj aliaj nekvalitaj. Kiu deziras aliĝi al Karnavalo devas enskribiĝi al iu de tiuj sambolernejoj kaj sekvi ĝin dum tuta unu jaro. Ili ekzercas la karnavalajn dancojn. La lernejo ankaŭ certigas al ili, pruntedonas la solenan festivalan robon kun aliaj multaj ornamaĵoj. Dum karnavalo kiu daŭras eĉ dum 7 tagojn ili estas aktivaj kaj dancas ĝis lasta forto. La plej grava okazaĵo dum karnavalo estas la prezentado de grupoj sur *sambodromo*, tiel oni nomas la lokon similan al grandega stadiono. La diferenco estas ke du flankoj de sambodromo estas malfermitaj tra kiu eniras la marŝantaj kaj dancantaj grupoj kaj aliflanke eliras. En aliaj du flankoj troviĝas la tribunoj kun seĝoj kie estas sidantaj miloj da spektantoj venontaj el la tuta mondo, speciale por ĝui la spektaklon. Kelkmil homoj pagas sufiĉe altan prezon por enirbileto luktante por pli bona loko sur tribunoj! Tiu „tradancado“ de la sambodromo daŭras longe, ĉar ĉiu skolo devas, atingante la centron, montri la propran dancprogramon. Ankaŭ la luksaj fantaziplenaj vestaĵoj estas gravaj kaj unu skolo portas samkolorajn kostumojn.

Ekzistas ĵurio kiu fine post unu semajno anoncas la rezultojn kiu skolo estis la plej elstara kaj gajnis la unuan lokon. Do, tio signifas ke



venontjare la plej multaj junulinoj novkandidatoj enskribiĝos al tiu "skolo". La tutan feston karnavalan stratiran defileon spektas ankaŭ la popolo kiu plenigas la stratojn kaj la tuta urbo "bolas" ekscitite. La karnavalistoj pro tio devas ankoraŭ dum horoj danci sur la stratoj. La publiko elkore aplaŭdas al ili ĝuante la spektaklon plenkore. Ili estas tiuj kiuj ne havis monon por eniri la sambodromon. Mi nur akcentas ke en Riodejaneiro vivas pli ol 6 miliono da loĝantoj kaj se nur la triono spektas la defileon jam pli 2 miliono da homoj estas surstrate. En tiuj tagoj estas starigitaj specialaj necesejoj por tiu homamaso kiuj pasigas horojn surstrate.

Kiam ĉiu trankviliĝas komenciĝas la preparo kaj la enskribado al nova lernejo. La kostumoj devas esti redonataj al lernejo. La lernejo vendas aŭ ŝanĝas la kostumojn kun alia lernejo. Poste al tiuj kostumoj estos aldonataj novaj detaloj, vualoj, plumoj, florornamoj ktp. La publiko venontjare ne rimarkos ke ili jam vidis tiujn kostumojn, ĉar nun portas ilin alia lernejo. Tiamaniere la lernejoj profitas. La uzado de kostumoj povas okazi eĉ 4-5 jarojn, nature la difektitaj estos anstataŭitaj kun novaj.

Dum karnavalo frunte de ĉiu grupo estas 1-3 veraj belulinoj la plej altaj, plej sveltaj, en aparte luksa kostumo, kun perfektaj dancmovoj. Verdire ili estas reprezentantoj de la lernejo. Poste sekvas 4-5 vicoj de junaj belulinoj kaj ankaŭ flanke de la vico, po 2-3. Meze de la grupo estas tiuj ne tro belaj kaj malaltaj, diketaj. Ĉe la fino jam neniu rigardas ilin ĉar alvenadas la sekva grupo kun okulfrape belegaj reprezentantinoj.

Imagu kiom foje estis kolektita 1000 dolaroj, kiom gajnas la lernejoj kaj kiom la urbo mem, ĉar parton de la mono la lernejoj devas doni al urbo. Ĉio tio estas "*bizniso*" kiel oni nun diras.

La tragedio estas tio ke instruistino monate salajras ĉ. 60 dolarojn. Eble la ĵurnalistino gajnas 100 dolarojn. Laŭ tiu matematiko, ŝi dum 10 monatoj, nek trinkis, nek manĝis ĉar la monon ŝparis por sambolernejo. Sed nature tiun ideon akceptis ankaŭ la familio ili ĉiuj helpis ke ŝia revo estu realigita.

Tamen, ŝi konfesis al mi ke jam estas la tria jaro ekde kiam ŝi ŝparas kaj nur nun sukcesis enpagi. Pro tio ŝi nun estas feliĉega ne povante elteni tion ne komuniki al mi. Mi vere tiam komprenis la egan "signifon" partopreni karnavalon.

Tiun nigran parton de la karnavalo ne vidas la riĉuloj kiuj pagas eĉ 1000 dolarojn esti en la unua vico de tribunoj en sambodromo. Ili vidas nur la brilon, la ĝuon, etoson, kunvivas sentante la vere belan vigan muzikon, miras pro la belegaj bonaj dancistinoj.

Nia proverbo diras: "Ne estas ĉio oro kio brilas".

Mi bedaŭras sed mi neniam eksciis ĉu la karnavalo feliĉigis la simpatian ĵurnalistinon.

Tereza Kapista

# Originala poezio

Vladimir Kirda Bolhorves

## STARICA NA BALKONU

Sva u crnini, zabrađena,  
ćutljiva i nepomićna,  
kao isklesana od kamena,  
dugo sedi kraj ograde  
skućenog otvorenog prostora  
dvosobnog kaveza na trećem spratu.  
Kćerka i zet su u preduzeću,  
unuci u školi. Susedâ ovde nema.  
Prašinu u stanu je obrisala, usisala,  
cveće je zalila, rućak skuvala.  
Kroz uzan, nebom ispunjen procep  
između dva susedna solitera  
još jednom se u daljinu,  
u davninu zagledala.

U selu, na dugaćkom šoru,  
ćezne za njom, kao verna kuja,  
draga, trošna kuća, u kojoj je  
ćetrdeset najlepših godina provela.  
Nedavno ju je, na zahtev dece, prodala.  
Nezaboravljeni, nenadoknadivi susedi  
i večeras će se na roglju sastati.  
Hoće li, tugo, i o njoj malo ćaskati?  
Mužu je punih jedanaest godina  
tri puta sedmićno na grob odlazila.  
A sad matori pod korovom spava.  
Hoće li, bože, deca bar jednu  
njenu molbu uslišiti:  
hoće li majku, iz milog sela,  
iz rodne grude išćupanu,  
pored oca sahraniti?

## AVINO SUR LA BALKONO

(Starica na balkonu)

Tute en funebra vestaĵo, kun kapo  
tukĉirkaŭita, silenta kaj senmova,  
kiel elĉizita el ŝtono,  
ŝi longe sidas apud la balustrado  
de malvasta malfermita spaco  
de duĉambra kaĝo sur tria etaĝo.  
La filino kaj bofilo estas en la entrepreno,  
nepoj estas en lernejo. Najbaroj ĉi tie ne ekzistas.

Polvon en loĝejo ŝi viŝis, ensuĉigadis,  
florojn ŝi akvumis, tagmanĝaĵon finkuiris.  
Tra mallarĝa, per ĉielo plenumita fendaĵo  
inter du najbaraj ĉielskrapantoj  
ankoraŭ unufoje en malproksimon,  
en iaman tempon ŝi fikse enrigardis.

En vilaĝo, en la longa strato,  
sopiras al ŝi, kiel fidela hundino,  
ŝatata, ruiniĝanta domo, en kiu ŝi  
kvardek plej belajn jarojn travivis.  
Antaŭ nelonge, je postulo de gefiloj, ŝi vendis ĝin.

Neforgesitaj, neanstataŭeblaj najbaroj  
ankaŭ ĉi-vespere je stratangulo kunvenos.  
Ĉu ili, ho ve, ankaŭ pri ŝi babilos?  
Al edzo plenajn dekunu jarojn  
trifoje semajne al la tombo ŝi iradis.  
Kaj nun maljunulo sub la herbaĉoj dormas.  
Ĉu gefiloj, ho dio, volos almenaŭ  
unu ŝian peton plenumi:  
Ĉu ili la patrinon, el la ŝatata vilaĝo,  
el naskiĝgrundo forigitan,  
apud la patro entombigos?

Esperantigis  
La aŭtoro

## DU MINIATUROJ

### ŜANĜOJ

Nenio estas por ĉiam.

Tago ŝanĝas nokton.  
Lumo kolizias kun mallumo.  
Printempo forpelas vintron.

Nenio estas eterna.

Infanoj fariĝas homoj.  
Rido venkas ploron.  
Maljuneco faldas Junecon.

Nenio certa estas.  
Nur ŝanĝoj restas.

### PONTO

Etendita mano estas ĝi,  
kunveno,  
loko de renkontiĝo.

Ĝi estas kiso  
de malproksimaj bordoj,  
beleco de kontakto.

Ligo de animoj ĝi estas,  
amikeco,  
venko de spaco.

Tenero kaj forto estas ĝi,  
arto de kreo,  
ekscitecoj de venkinto.

Ĝi staras  
inter rivero kaj nuboj,  
inter morto kaj vivo,  
la vivo sola estas.

# Tradukoj

**Simo Matavulj (1852-1908)**

## **BAKONJA FRAT'-BRNE (Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

(Deka parto)

### **TERURO (daŭrigo)**

Kie estas saketo? diris la kuracisto al Korpulentulo, poste eltiris el ĝi ian pintigitan tubon, kies pinton li trempis en akvon, post kio li ektiris al si la stangeton el la tubo. Farante tion li parolis ion itale al la monakoj, kiuj tre pene turnis ventren la monakejestrinon kaj deprenis lian pantalonon.

Se iu estis dirinta al Korpulentulo ke li tiun tagon ekmiros pri ankoraŭ io, Korpulentulo ne estus kredinta, sed vidinte kion la kuracisto faris, Korpulentulo konsterniĝis.

-Jen, bubo, tion vi denove faros al li antaŭtagiĝe! diris la kuracisto al Korpulentulo, donante al li la enŝprucigilon.

-Mi?! diris Korpulentulo pala kaj ekstremanta. Mi tion ne farus eĉ al mia paĉjo!

-For, kapristo Zvrļjeva! ekkriis Vostvolvulo. Ke vi tie ĉi fanfaronu, kvazaŭ vi estus iu sinjoro, kaj ne nia servisto! For de miaj okuloj!

Trogulo frapis la kapon de Korpulentulo.

Post la vespermanĝo komenciĝis vigla interparolo inter la monakoj kaj fremduloj. La senliphara juĝisteto estis kvazaŭ ŝercanta, ĉar ĉiuj ofte ridadis. La adjunkto nemulte parolis, sed al ĉiu kapjesis. La kuracisto, tuj post la manĝado, ekfumis dikan cigaron, rigardante bildojn surmure. La skribisto vere volis montri ke li estas dorlotita, kaj sekve li malmulte manĝis kaj trinkis, kaj levadis la glason per du fingroj.

La parolo unue temis pri forrabo. La juĝisto finrakontis ke tiuvintre estis forrabitaj kvar latinaj preĝejoj en lia regiono. Li parolis pri la bando de Radrek kiu pasigadis vintrojn en Kotor kaj Marbordo, dum somere ĝi restadis en Bosniaj montaroj, kaj atingadis eĉ serbian limon. Parolante pri komplikoj, la juĝisto daŭrigis:

-Pri ĉio Radek kulpigata! Pri ĉio Radek kulpigata, dum la alia fripono rabadas je lia kosto! diris li. Kaj kie estas tiu Radek!... Ĉu li povas venadi tien, reen, tien, al ĉiu loko? Jen, sinjor' mia, kvar kolonoj de gardistoj promenadas senĉese tien-reen en Bukovica, Kotor, de unu vilaĝo al la alia, de montaro al montaro, kaj Radek forestas!

-Ĝuste forestas, diris Koleremulo ridante.

-Li forestas! Kaj tiom da dinaroj estas elspezataj por spiono, diranta: "Jen, Radek tie, jen!" Kaj la sama spiono diras al Radek: "Jen gardistoj tie, fuĝu!" Ĉu estas tiel, sinjor' mia?... Mi diras al vi: Dalmatio havas kvindek mil hajdukojn!... Tiukaze ne helpas rimedo (medikamento), sed pendumilo, pendumilo, kaj pendumilo!...

Ili transiris al interparolo pri la malsanulo.

-Do, doktoro, kio ŝajnas al vi rilate al nia monakejestro?

-Li povas transvivi, sed povas ankaŭ morti.

-Stranga saĝaĵo! flustris Korpulentulo al la kamaradoj, interpuŝiĝintaj ĉeporde. Estas ja saĝa ĉi-virkaprego ortodoksulaĉa, pro kiu mi ricevis la kapfrapon! Ho, se mi povus ekgrati lian dorson.

La kuracisto elspiris longan fumŝprucaĵon, kaj komencis klarigadi kio estas apopleksio.

-Se Dio lasus ke li rekonsciiĝu, por ke ni komuniu lin, diris Betulo.

-Estus pli bone ke li eĉ ne rekonsciiĝu se li jam devas morti, diris la kuracisto.

-Ne estas tiel, mia doktoro, aldonis Brne. Malgrandaj estas ĉi-mondaj suferoj laŭ tiuj kiuj nin atendas en la alia mondo, se ni ĝustatempe ne refortiĝos per la sankta pentsakramento! Antaŭ nelonge subite, nepreta, mortis iu pastro, kaj poste li ne havis trankvilon en la tombo, sed aperadis jen al unu, jen al la alia, konsilante ĉiun esti ĉiam preta por la lasta horo....

-Tio estas oldulinaĵoj, interrompis lin la kuracisto, preskaŭ kolere.

-Tio ne estas oldulinaĵoj, diris la adjunkto, ĝis tiam silentinte. Almenaŭ ne laŭ nia religio...

Frat'-Brne kaptis tion kaj komencis helpenvoki Jeronimon, Aŭgustinon, Akvitanon, kaj fine pruvadis ke ne estas logikaj ĉiuj tiaj kristanaj religioj kiuj ne konfesas "purgatorion", dum ili tamen preĝas por la mortintoj..

-Jen, doktoro, ne malbontrovu, vi kristanoj ne kredas ke la purgatorio ekzistas, kial ja vi tiukaze pagadas preĝkontribuaĵojn kaj mesojn por la mortintoj? Diru, mi petas vin, kion helpas tio al ili? Kiu estas en la infero, tiu ne povas esti per preĝoj eligita, kaj kiu estas en la paradizo, tiu ne bezonas ilin? Ĉu estas tiel? Nu, se estas tiel, kion, do, helpas la preĝoj al viaj mortintoj?

-Ili helpas, ĝuste, nek al la niaj, nek al la viaj, sed ili estas bonvenaj al pastroj!

La juĝisto ekridis, dum la adjunkto ruĝiĝis kaj komencis rakonti al ili ke ĉiuj ortodoksuloj estas ĝenerale malmulte informitaj pri la aferoj de sia religio, eĉ la plej kleraj estas veraj nesciantoj de tio. La kuracisto unue neis la neceson de tiu informado, poste eĉ la neceson de kredado, sed kiam la adjunkto troigis sian laŭdadon de la latina preĝejo, tiam ankaŭ la kuracisto komencis laŭdadi sian ortodoksecon, tiel ke, vere, pli bone ne laŭdvolus eĉ Zadar-episkopo.

Vostvolvulo subite leviĝis; post li ankaŭ “la komis’iono”, kaj ili foriris en la gastĉambrojn, kaj la kuracisto kun la monakoj al la malsanulo.

Korpulentulo deturniris en la malnovan porjunulan kuirejon. Ĝi estis plena je transriveruloj. Oni konjektadis kiu povis forrabi la monakejon kaj kiel tio povis okazi. La komuna opinio estis ke tion faris “Radek”-bando, kiu enhavis malpleje 30 kamaradojn, kompreneble ĉiujn “ortodoksulaĉojn”. La pliparto ne kredis ke Stefano kondukis la hajdukojn, sed tion povis fari iu alia servisto, el tiuj kiuj servistis antaŭ Stefano, ĉiukaze “iu kaŝita ortodoksulaĉo”. Kaj koncerne Kruĉegulon, ĉiuj estis konvinkitaj ke li pafmortis. Verŝajne li eliris kaj trafis la banditojn, poste (pro timo kaj ne por igi alarmon) komencis krei, pro kio ili forbatis lin kaj ĵetis en akvon. Tiu suspekto estis praviga, ĉar ankaŭ Strabulo poste ekrememoris ke iu elirantis el la porjunula kuirejo, sed ĉiuj ĉeestaj servistoj neis ke iu el ili elirantis.

La kuiristo interrompis tiun interparoladon, kriinte de ĉe la pordo:

-Ĉu tie estas unu el la diakonoj? Iru li tuj en la preĝejon! Ankaŭ vi, homoj, eliru por forakompani la sanktegaĵon! (t. e. tiun stelon, kiu entenas komuni-macon).

-Ĉu frat’-Vice estas ĝuste mortonta? demandis iu.

-Kaj ĉu oni ja forŝtelis ankaŭ la sanktegaĵon? demandis flustre Korpulentulo.

-Silentu, malfeliĉa bubo! respondis al li, ankaŭ mallaŭte, Ekskrementulo. Niaj homoj kredas ke neniu povas levi la sanktegaĵon, escepte de monakoj, kaj tial ne estas bone ke ili aŭgu... Iru, fraĉjoj, iru!

Nek Korpulentulo nek vilaĝanoj estis ĝis tiam enirantaj la rabitan preĝejon, kaj ili konsterniĝis vidante la tutan hontaĵon! La preĝejo aspektis eĉ pli terure kontraŭ la bruligitaj vakskandeloj, kiujn Bujas kaj Virvulpo antaŭ la granda altaro. Korpulentulo eniris la sakristion, de kie li baldaŭ eliris en diakonĉemizo, tintigante la sonorilon, kio signalas ke oni elportos post lin “la sanktegaĵon”. La vilaĝanoj surgenuiĝis. Virkato malvolvis silkan tendon super Onklino, kiu elportis ion envolvitan per la orteksita ĉifono. Post ilin iris Vostvolvulo, portante skatolon da sankta oleo. Vostvolvulon sekvis ceteraj kvin monakoj, adjunkto kaj skribisto, ĉiu kun bruligita vakskandelo. Ilin kuniris Ekskrementulo kun la vilaĝanoj, irantaj duope, post kio ili trairis la korton, poste la ŝtuparon, poste la vestiblon ĝis la monakejstra ĉelo, antaŭ kiu ĉiuj laikoj ree surgenuiĝis,

dum la monakoj kunĉirkaŭis la liton legante preĝojn. Korpulentulo fingre leviĝis, sed nenion vidis. La knabo demandis sin:

-Nu per kio ili komunios lin, ĉar la sanktegaĵo forestas, kaj la komuni-maco estas neportenda je la nudaj manoj?

Nur post kiam oni disflankeniĝis, Korpulentulo vidis la plumbe bluiĝintan, senkonscian monakejestrin kapon. Tiam komenciĝis la rito de sanktoleado, kiun, kiel konate, oni faras al mortintoj ĉe katolikoj. Frat'-Onklino oleŝmiris la malsanul-palpebrojn, -frunton, -tempiojn, ktp., poste ili sep benis lin kaj diris al la amaso disiri.

Korpulentulo apenaŭ atendeĝis tion. Kvankam dorminte proksimume kvar horojn posttagmeze, li ree estis tre laca. Li foriris en la ĉelon, kaj sidiĝis kun la vergeto enmane, por grati la "frat"-on tuj post lia alveno, sed Korpulentulon venkis la sonĝo, kaj li endormiĝis vestite.

-Li vekigis kiam la suno estis plialtiĝinta, kaj vidis ke la onklo jam eliris; ĝuste tiu volis subite pretiĝi, ĉar akvo estis disverŝita sub la lavujon, dum la viŝtuko estis surplanke. Korpulentulo rapide foriris en la monakejestrin ĉelon, kiun li trovis ordigita – la lito enorda, ĉio forviŝita, - ĝuste kvazaŭ frat'-Funelo estus foririnta promeni. La hararo de Korpulentulo hirtiĝis kaj li ekkuris al la porjunula kuirejo, el kiu ŝprucadis fumo kaj alvenadis tumulto, kio neniam okazadis dumtage. Tie la transriveruloj rostturnadis du virŝafojn, dum Beljan kaj Strabulo zorgis pri la granda kaldrono, en kiu ŝajne bolsvarmis brasiko. Korpulentulo foriris en la supran kuirejon, kie li trovis Ekskrementulon kaj Bujason, kiuj laboregis ĉirkaŭ la fajrejo.

-Kion?... Ĉu la monakejestro forpasis? demandis ilin Korpulentulo.

-Kie ja vi estas, povra knabo? diris Grgo. Kio okazas kun vi? Mi senĉese demendadas ekde ĉi-mateno: Nu kie estas la malgranda Jerkoviĉ, kiel povas okazi ke li forestas, ĉar mi pleje bezonas lin? Ĉu vi ja scias ke hodiaŭ tagmanĝos ĉe ni minimume dudek monakoj kaj la provincestro?

-Eĉ la provincestro!... Nu, la monakejestro do mortis?

-Sed li atendu ĝis kiam vi leviĝos? diris Bujas. Li mortis ĝuste je la unua horo post noktmezo, kaj ni alprenis lin en la preĝejon je la sepa horo. Jam estis ankaŭ tri mesoj. Mi pensas ke nun via onklo servas la kvaran...

-Kiel? Ĉu oni povas servi meson en la forrabita preĝejo?

-Strabulo iris transriveren, al la plej proksima paroko, sekve venis frat'-Tome kaj alportis la sanktegaĵon kaj ĉion necesan al unu altaro, jen tiel, diris la kuiristo. Ek, mia knabo, trinku iom da kafo, poste foriru en la preĝejon por kisi la monakejestrin manon, kaj poste tuj revenu. Se frat'-Bare (Vostvolvulo), aŭ la onklo, aŭ iu alia mesulo emos restigi vin, diru al ili ke mi petis ke ili lasu vin, ĉar mi bezonas vin, mi multe bezonas vin, kaj Ante (Bujas) povos foriri.



-Fakte, ĉu oni hodiaŭ grasmanĝos? demandis Korpulentulo matenmanĝante. Hodiaŭ, je la dua tago de la granda fasto!

-Konsidere tiajn ĉi cirkonstancojn, oni havas "sendevigon", diris Bujas, kun tia mieno, kiu signifis: Korpulentulo, vi ankoraŭ ne komprenas kio estas "sendevigo".

-Kaj ĉu la komisiono estas ankoraŭ ĉi tie? daŭrigis Korpulentulo.

-Diablo foririgis ilin frue. Antaŭ ol ni alprenis la mortan korpon, ili estis en la preĝejo kaj notis ĉion... Frat'-Onklino taksas ke la domaĝo sumas proksimume dudekmil talerojn! Tiu maljunulaĉo juĝisto kaj tiu virkapro ortodoksaĉa, kuracisto, ridis rigardante la deformitajn sanktulojn. Ho! tiu ortodoksulaĉo! diris kaj dentgrincis Korpulentulo ekirante al la preĝejo.

Ses flankaltaroj estis kovritaj per nigraj kurtenoj. Meze de la preĝejo kuŝis la mortinta monakejestro, sur la sama "katafalko", kiu servis por Kaŭrulo kaj multaj aliaj antaŭaj al li. Malantaŭ la kapo de la mortinto ariĝis trideko da gevilaĝanoj, el la frataro de la mortinta frat'-Vice. Korpulentulo ekmiris kiel ili rapide alvenis. Sur la ĉefa altaro estis riparita tiu traborita okulo de la s. Frane, kaj lavitaj la lipharoj. Antaŭ li estis tiom da artefaritaj floroj kaj kandeloj ol ĝis tiam sur tri altaroj.

Salivumulo servis meson. Flanke, krom la ĉi-domaj, genuis ankoraŭ ses-sep monakoj. Kelkajn el ili Korpulentulo vidis je "indulgenco", sed la plimulton li ne konis.

El la preĝejo Korpulentulo forkuris en la novan porjunulan kuirejon, kiun ankaŭ sufoke plenigis la transriveruloj kaj kie manĝaĵoj estis preparataj. Krome, estis ankaŭ eksteraj homoj kaj en la muelejo kaj en la forĝejo. Al Korpulentulo plaĉis kiam li aŭdis ke iu parolas pri li.

-Ĉu vi vidas – diris li – tiun ĉi diakoneton? Tio estas nevo de Trogulo, sed, je mia dipatrino, li ne similas tiun. Hieraŭ li transnaĝis la riveron surĉevale, same kiel Koleremulo! Jen, knabo, kaj oni eĉ diris al mi ke li ne scipovas naĝi!

-Nu, ni bone konas Korpulentulon! diris la alia, vere la monakeja farmulo.

Korpulentulo forkuris al la akvoveturilo, sed vidinte surborde Koleremulon, li haltis. Dundak kaj Trtak estis kun la bestflosa je la alia flanko, kie ili, ŝajne, interdisputiĝis kun la gastoj. Estis multe da gastoj kiuj interpuŝiĝis por kiom pli frue atingi la floson. La penetraj okuloj de Korpulentulo rekonis en la amaso la patron kaj onklojn: Ronkulon, Traserĉulon, Naĝkataron, Manlamulon. Kun ili estis ankaŭ malkorpulenta monako de Zvrljevo (Mirige, la monakejanoj ĉiam sendadis al Ĝvrljevo-paroko la malplej konsiderindan monakon. El dudektri frateculoj-Jerkoviĉoj, kiuj dumtempe "estis kaj monakis", nur tri monakis en sia naskiĝloko. Korpulentulo revenis al sia Ekskrementulo. Dumrevene li senĉese pensis pri la malfeliĉa Kruĉegulo kaj tre ekbedaŭris lin, kaj

sekve li ne volis eliri ĝis la fino de la tagmanĝo, kvankam Hirtulo dufoje vokis lin pere de Bujas...

Korpulentulo, Bujas, Strabulo kaj iu fremduleto el la urbo apenaŭ sin regis servante sur la monaka tablo. Virvulpo iom kapriciĝis kaj ne volis moviĝi el la porlernanta manĝejo. Virkato legis pri la sanktulvivo. La okuloj de Korpulentulo kaŝrigardis la *provincestro*n ĉe la tablofrunto.

Tio estis grasa maljunulaĉo, kun la duobla submentono, kiu dummanĝe dormetis kaj sur kies vizaĝo kvazaŭ legeblis: “Ho, se vi sciis kiel ĉio ĉi estas teda al mi!”. La provincestro ne loĝis en la urbo, sed en la plej proksima monakejo, kaj li jam delonge havis tiun altan rangon. Korpulentulo aŭdis ke tiu maljunulo estis fama “konanto de glagoljica<sup>1</sup>”.

Nur tagmanĝe Korpulentulo rimarkis en la manĝejo tion kio povis lin pleje mirigi. Kaj tion li mem ne rimarkis, sed (post kiam ilia servado malpliĝis) Bujas ekpuŝis lin kaj demandis:

-Ĉu ĝi belkonvenas al li?

-Kio belkonvenas? Al kiu belkonvenas?

-Nu, fraĉjo, frat'-vestaĵo al Virkato! Ĉu vi ne vidas ke li “enrobiĝis”? Ĉu vi ne sciis?

-Ho, Jesuo! Ho, Virgulino! ekkriis rigardante Virkaton malantaŭ la pupitro en la noveca sutano kun la neĝblanka ŝnurego. El la kapuĉo ŝajnis, ke Virkat-kolo estas ankoraŭ pli longa, kaj tiuj kataj okuloj – pro kiuj li ĝuste ricevis la alnomon – ankoraŭ pli katecaj. Korpulentulo ekmiris kiel li tion tuj ne vidis, poste li tuj ekpensis ke, jen, la okazaĵoj en la monakejo komencis viciĝadi fulmrapidece. Nun okazas dum minutoj tio por kio antaŭe necesis jaro!

-Nu kiel? Ĉu li diakoniĝis? Kiam?

Al ĉiuj demandoj li rapide ricevis respondojn.

Tiu ankoraŭ ne diakoniĝis, sed morgaŭ li tion faros, post la elekto de nova monakejestro. Li ne ĉion finlernis, sed la monakejo bezonas diakonon, ĉar Ĉimavica ne volas reveni. Eĉ tio ne helpus lin, sed Virkat-onklo, Balgo, estas malnova amiko de la provincestro. Poste frat'-Salivumulo volis ke la provincestro diakonigu Virvulpon, sed tio ne povas okazi, kaj tial Virvulpo estis kolera. Pro tio Salivumulo, tuj post fino de “tiu ĉi afero”, iros al unu vakanta paroko, kaj Virvulpo al alia monakejo... Kaj, aldone, ekzistas ankoraŭ unu novaĵo. Unu frato de frat'-Onklino alkondukis fileton, kiu restos kiel lernanto.

Ĉiuj tiuj novaĵoj profunde impresis Korpulentulon, kaj pri la lasta li ĝojiĝis. Do, li ne plu estos la plej juna lernanto en la monakejo!... Kiel la plej juna, li ja estas tuj post Bujas laŭrange! Do, post du jaroj – pleje post tri – li povos diakoniĝi, nur li aliĝu al lernado!... Li volas, li aliĝos lerni diligente. Belas ankaŭ tio ke ekzistos du monakoj malpli, kaj ke la orgojla Virvulpo foriĝos. Tio ja estas vera favoregaĵo. Korpulentulo volis ĝojsalti.

---

<sup>1</sup> Malnovslava alfabeto

Denove ja kaptis lin la eta kapturniĝo pro la ekpenso: kiel ĉio ĉi okazas rapidege! Dume, ĉio ĉi forestus se la ortodoksulaĉoj ne forrabis la monakejon, se frat'-Vice ne mortis subite! Dio indulgu, homo povus esti eĉ dankema... Nu kiu, fine, konas Diajn sekretajn vojojn, pri kiuj rakontas al ni la teologia scienco!

Post la tagmanĝo, Vostvolvulo proponis ke la enterigo tuj okazu, por ke almenaŭ la plimulto da vilaĝanoj disiru. Sur la vizaĝo de la provincestro, krom la esprimo: "Ho, kiel ĉio ĉi estas teda al mi!", aperis ankoraŭ, kvazaŭ iu demandsigno, kiu signifis: "Kiel? Ĉu ja oni ne ekkuŝu post la manĝado?" Kaj ĉiuj ceteraj monakoj ekpensis tion, sed la maljunulo subite ŝanĝis la opinion, kaj diris, oscedante:

-Nu... finfine frat'-Bare pravas, ĉar ĉeestas tro multe da homoj, kaj...ĉi-nokte... ne... estus... bele. Kaj poste ankaŭ *aliaj aferoj* estas kiom eble pli rapide finendaj.

Oni ordonis al la lernantoj por tuj sonorigi. Pli junaj monakoj foriris por laŭordigi la vilaĝanojn por procesio. Korpulentulo vidis patron en la vestiblo antaŭ la porjunula kuirejo kaj mansvingis al li, pro kio Hirtulo postiris lin. Hirtulo estis agrable surprizita kiom Korpulentulo kreskis dum la jaro kaj duono, de kiam ili ne vidis unu la alian.

-Bela mia infano, diris li, post kiam ili interkisiĝis.

-Ni ne havas tempon, paĉjo, kaj ni diru nur iom da vortoj! Kaj, irante, Korpulentulo rakontis ĉiujn ekestontajn ŝanĝojn kaj siajn esperojn. -Nur mi zorgas kia estos nova monakejestro, kaj tio certe estos Vostvolvulo, kaj li, vi scias, ne bonrigardas nin Jerkoviĉojn... Kaj ĉu vi konas fraton de Onklino? Kie estas tiu lia bubo, tiu nova diakono? Mi apenaŭ atendas por vidi lin.

Korpulentulo forfuĝis, ĉar li aŭdis post si la voĉon de sia onklo Hokstango.

La funebra ceremonio estis finita, kaj la monakoj portis la monakejestron trifoje ĉirkaŭ la preĝejo kaj enportis lin en la tombejon, kie Trogulo komencis "vortumi". Korpulentulo aŭdis nur la komencon, - t.e. kion diris Jeronimo, Aŭgustino kaj ankoraŭ iuj sanktaj patroj pri la morto, - kaj kiam estis alvenonta tio kion, eble, ankaŭ li komprenus, tiam alproksimiĝis al li la kuiristo flustrante:

-Iru ni, mia knabo, ĉar ni ne povas senlabori. Ni devas senskvamigi fiŝojn kaj knedi ian fastan paston!

Korpulentulo skrapadis barbfiŝojn kaj trutojn, dum lia kapo bruis pro pensosvarmado. Interalie, li demandis sin ĉu vere venis tiu etulo de Onklino kaj ĉu ankaŭ Funelo vampiriĝos.

-Funelo ne vampiriĝos, ĉar jam delonge li ne multe pekis. Vere, li sola, vespere en la ĉambro, trinkadis iom pli multe, sed tamen li mortis kiom-tiom enorda.

Dum ili tiel interparolis, la onklo-voĉo atingadis ilin je momentoj el la tombejo, poste aŭdeblis iu tumulto, iom poste ekbruis paŝoj antaŭ la

malgranda preĝejpordo. La kuiristo kaj Korpulentulo alfenestriĝis. El la preĝejo svarmeliris la longa procesio de monakoj kaj vilaĝanoj. Ekestis interpuŝiĝo kaj tumulto. Koleremulo kaj Vostvolvulo iradis de unu al la alia. Ĉirkaŭ la provincestron kunvenis la monakejestraraj frataranoj; ĉirkaŭ Virkaton – la liaj, ĉirkaŭ Trogulon – Jerkoviĉoj. Kun Onklino apartiĝis bele vestita vilaĝano kaj kun li – dekdu-dektrijara knabo. La koro de Korpulentulo ekstremitis, kaj li pli bone ekpozis. Tiam rimarkis lin Hirtulo, kaj direktiĝis al la ŝtuparo.

-Kien vi, Jerkoviĉ? ekkriis Vostvolvulo.

-Mi ja iras mansaluti mian infanon. Jen mi pro li piediris unu tagon, kaj jen ni eĉ ne revidis unu la alian. Kiel tio povas esti!? Kaj Zvrljevoestro digne supreniris.

Korpulentulo malsuprenkuris renkonten.

-Nu kion ĉi faras la monakaĉoj? diris li al la knabo. Ili forpelas homojn el la domo de la s. Frane, - homojn kiuj, pli-malpli distance, venis al la funebro!... He, tio ĉi ne estas belaj signoj, tio ĉi...

-Paĉjo, ne faru skandalon, pro Dio! Ne faru pro mi...

-Nu, mi havas multe interparoli kun vi, kun Brne kaj vi! Mi devas resti!...

-Vi ne povas, paĉjo, ĉar tiukaze restus la ceteraj kaj multaj aliaj, kaj mi aŭdis kion la monakoj hodiaŭ decidis. Iru, paĉjo, kaj salutu panjon kaj ĉiujn, ĉiujn ceterajn...

Kiam Korpulentulo revenis al la fenestro, li vidis en la korto nur la provincestron kun kvin-ses pli maljunaj monakoj.

Ĵus antaŭ la vespermanĝo frat'-Onklino alkondukis sian nevon en la kuirejon kaj transdonis lin al liaj kamaradoj. Korpulentulo kore ĉirkaŭbrakis lin. Tio estis belega knabo, sana kiel pomo, mienafabla, kiun pro liaj pufetaj vangoj oni tuj baptis per la nomo "Ŝvelulo". La vespermanĝo pasis sammaniere kiel la tagmanĝo. Virkato denove "legis pri la vivo de sanktulo", poste li eksidis kun ili. Brne sporade rigardis la nevon kaj ŝveligadis la vangojn. Korpulentulo ĝuridis, ekpensante ke estas la unua tago, ekde kiam li restadas en la monakejo, ke li gratas nek la dorson nek la kruojn de la onklo. Kaj ankoraŭ, tio estas la unua nokto, kiam Korpulentulo ne tranoktos en la onklo-ĉelo, kie Bujas jam preparis por tri gastoj. Korpulentulo, Bujas kaj Ŝvelulo dormis en la manĝejo.

Sed nur la morgaŭa tago estis "tago de okazaĵoj", kiel diris Korpulentulo.

Post la matenpreĝo okazis, en la manĝejo, kunveno por la elekto de nova monakejestro. La elekto estis farita per la skriba voĉdonado. Kiam oni kolektis slipetojn kaj tralegis, la "lotaĵo" estis destinita al frat'-Brne. Vane li kontraŭis tion pretekstante sin per malsano de la dikfingroj, li tamen devis akcepti la monakejestraron dum tri jaroj.

Post tio okazis la granda meso, dum kiu oni diakonigis Virkaton. Korpulentulo nur elkuris el la kuirejo por vidi tiun riton, kaj poste li denove revenis. Sed kiam iom poste venis Strabulo por sciigi ke la *kolonanoj* (gardistoj kiuj tiutempe peladis hajdukojn) transveturigas sin, Korpulentulo elkuris antaŭ la monakejon, kie jam ariĝis ĉiuj monakoj, lernantoj kaj servistoj. Dudeko da kolonanoj estis venantaj de la akvoveturilo. Ne estas scieble kiu el ili estas pli bonaspekta kaj pli bonstatura! Sur ĉiu agrafoj, kunbutona drapjako, ĉezone paro da pistoloj kaj tranĉilo, ĉiesŝultre ĉu fusileto ĉu karabeno.

-Dio helpu, monakoj! kriis la estro depreninte la ĉapon, sur kiu estis kvasto atinganta liajn ŝultrojn.

-Dio helpu! salutis unu post la alia, poste ili haltis ĉirkaŭ sia estro. Nur triopo laŭviciĝis por mankisi la monakojn kriante:

-Laŭdata Jesuo!

Li eĉ nun parolis kvazaŭ li estus leganta, uzis multajn nekutimajn laŭlibrajn sciencajn esperimojn. Sed tio estis la uniko kiu restis de la iama Maks. Alie, tute ne temis pri poezio, pri libroj. (Neniu plu rememoras *Prometeon*.) Unue li parolis ion pri la milito ĝenerale, ja kun granda amareco, pli en la tono ol en vortoj, kun amareco kiu eĉ ne atendas esti perceptita. (Por li en ĉi tiu granda milito, por tiel diri, ne estis plu kontraŭaj frontoj, ili intermiksiĝis, transversadis unu la alian, kaj tute kunfundiĝis. La universala suferado vualis lian vidon kaj forprenis la komprenon por ĉio alia.) Mi rememoras mian konsterniĝon kiam li diris ke li gratulas al la venkintoj kaj – ke li ilin profunde bedaŭras, ĉar la venkintoj vidas sian situacion kaj kion ili devas fari, sed la venkintoj eĉ ne konjektas kio ilin atendas. Li parolis per incitiĝema kaj senespera tono de homo kiu perdis multon kaj nun povas diri kion li volas, sciante bone ke pro tio neniu povas fari ion al li, kaj ke tio tute ne helpas al li. Post tiu granda milito oni renkontis inter la intelektualoj sufiĉe da tiaj *koleraj* homoj, koleraj laŭ iu speciala modo al io nedefinita en la mondo. Tiuj homoj trovis en si mem nek kapablon por pasiĝi kaj adaptiĝi, nek fortojn por grandaj decidoj en la kontraŭan direkton. Li ŝajnis al mi tiumomente, estis unu el ili.

Sed nia konversacio interrompis, ĉar nek li nek mi deziris disputi dum ĉi tiu punkto, sur tiu nekutima loko de renkontiĝo, post tiom da jaroj. Pro tio mi parolis pri aliaj aferoj. Fakte, parolis li. Parolis li eĉ nun por tiuj siaj elektitaj vortoj kaj kunmetitaj frazoj kiu homo kiu vivas plie kun libroj ol kun homoj, fride kaj reale, sen ĉirkaŭfrazado kaj pribeligo tiel kiel malfermante la medicinan lernolibron ni trovis en ĝi la simptomojn de nia malsamo.

Mi ofertas al li cigaredon, sed li diras ke li ne fumas, kaj elparolas tion subite, preskaŭ kun timo kaj abomeno. Kaj dum mi ekbruligas unu cigaredon sur la alia, li parolas iel artifice, senzorge, kvazaŭ li per tio estis forpelinta aliajn, pli gravajn pensojn:

– Jen, ni du alpaŝas larĝan relvojon, kaj tio signifas: ni manprenis la anson de la pordo kiu kondukas al la granda mondo. Ni forlasas Bosnion. Mi eĉ neniam revenis tien, sed vi faros tion.

– Kiu scias? – interrompis mi lin mditeme, pelita de tiu speciala vanto laŭ kiu junaj homoj ŝatas vidi sian sorton en foraj landoj kaj sur nekutimaj vojoj.

– Ne, ne, vi ĉiukaze revenos – diris mia kunvojaĝanto certe kvazaŭ li metus diagnozon – kaj ankaŭ mi la tutan vivon kunportos rememoron al Bosnia kiel iun bosnian malsanon kiun kaŭzis, mi mem ne scias certe. eble tio kie mi naskiĝis tio kaj plenkreskis en Bosnio, aŭ ke mi neniam revenos tien. Ne gravas.

Sur nekutima loko, en nekutima tempo ankaŭ la konversacio fariĝis nekutima, iomete kiel en sonĝo. Mi rigardas transverse la grandan, kuntiritan silueton de mia iama kamarado apud mi kaj pensadas: mi opinias ke li malmulte similas al tiu junulo kiu frapadas per pugno kaj recitadis "Kovru ĉielon vian, Zeŭso!..." – mi pensas pri tio kio ni devenos se la vivo tiel rapide kaj tiel profunde ŝanĝos nin, mi opinias ke nur la ŝanĝoj kiujn mi rimarkas sur mi mem estas bonaj kaj regulaj. Kaj dum mi pri ĉio tio pensadas mi subite rimarkas ke la kamarado apud mi denove parolas. Rekonsciiginte el miaj pensoj, mi aŭskultas lin atente. Tiel atente ke ŝajnas al mi ke ĉiuj tiuj stacidomaj bruoj ĉirkaŭ mi eksilentis kaj ke nur lia voĉo aŭdiĝas en la venta nokto.

– Jes longtempe mi vere opiniis ke mi samkiel mia patro pasigos la vivon sanigante la sarajevajn infanojn, kaj ke mi, samkiel li, lasos min enfosi en la tombejo de Koŝevo. Jam tio kion mi vidis kaj travivis en la bosniaj regimentoj dum la milito ŝanceligis min koncerne tion, sed kiam mi ĉisomere estis malmobilizita kaj pasigis entute tri monatojn en Sarajevo, fariĝis klara al mi ke mi tie ne povos resti kaj vivi. Kaj la nura pripenso ke mi vivu en Vieno, Triesto, aŭ en iu ajn alia aŭstra urbo provokis en mi abomenon, abomenon ĝis vomado. Kaj pro tio mi komecis pensadi pri Sud-Ameriko.

– Bone, ĉu oni povas scii kio estas tio pro kio vi fuĝas el Bosnio?  
– demandis mi maldiskretece kiel personoj de mia aĝo tial starigis demandojn.

– Do, "oni povas scii", sed tio ne estas facile tiel dum traŭro sur la stacio, resume diri. Sed se mi tamen estus devinta diri kio min forpelas el Bosnio mi dirus: malamo.

Maks subite leviĝis, kvazaŭ li parolante neatendite estus frapita kontraŭ iu nevidebla barilo. Ankaŭ mi elmergiĝis sur la realecon de la malvarma nokto en la stacio de Slavonski Brod. La vento fariĝis ĉiam pli forta kaj pli frida, lumoj flagretadis kaj malaperadis en distanco, malgrandaj lokomotivoj fajfadis. Super ni malaperis eĉ tiu etparto de ĉielo kun sporadaj steloj, nur nebulo kaj fumo kreas indan kovrilon por ĉi tiu ebena sur kiu oni ŝajnas al mi ĝisokule dronas en la nigran grasan plugkampon.

En mi anonciĝis kaj subite grandiĝis furioza kaj agresema deziro kontesti lian asertadon, kvankam ĝi ne estis al mi sufiĉe klara kaj komprenebla. Ni ambaŭ konfuzite silentis. Peze ĉeestis tiu silento inter ni en la nokto, kaj ne estis antaŭvideble kiu el ni ekparolos la unua.

Tiumomente ekaŭdiĝis el malproksimobruego de la rapidvagonaro kaj tuj poste ĝia peza fajfo, obtuza, kvazaŭ ĝi venus de sub betona volbo. La tuta stacidomo subite vigliĝis. Centoj da ĝistiam nevideblaj

figuroj leviĝis en la mallumo kaj komencis kuri direkten de la trajno. Eksaltis ankaŭ ni du kaj levis la valizojn, sed la tumulto en kiun ni enfalis, ĉiam pli disigadis nin. Mi sukcesis ankoraŭ nur alkrii lin mian beogradan adreson.

Post deko da tagoj mi ricevis en Beogrado konsiderinde grandan leteron. Laŭ la grandlitera manskribo mi ne povis diveni de kiu ĝi estas. Tio estis germanlingva litero de Maks el Triesto.

"Kara malnova amiko,

Kiam ni hazarde renkontiĝis en Slavonski Brod nia konversacio estis intermitada kaj peniga. Eĉ se ni estus havinta pli bonan okazon kaj pli da tempo, mi ne kredas ke ni estus povinta interkonsenti kaj meti klaran ĉion. La neatendita renkontiĝo kaj la subita disiĝo tute malebligis tion. Mi estas prepariĝinta forlasi Trieston kie vivas mia patrino. Mi ekveturas al Parizo kie mi havas laŭpatrinajn parencojn. Se estos tie permesita al mi eksterlandano kuracista praktiko, mi restos en Parizo, se ne, mi vere iros al Sud Ameriko.

Mi ne kredas ke tiuj malmultaj nekunligitaj alineoj kiujn mi haste skribas povas en viaj okuloj tute klarigi la aferon mian "fuĝon" el Bosnio. Tamen mi ilin sendas, ĉar sentas ke mi ŝuldas al vi respondon, kaj ĉar rememoriginte niajn lernantjarojn, mi deziras ke vi min ne perceptu erare kaj ne rigardu en mi simplan germanaĉon kaj "migremulon" kiu facilanime forlasas la landon kie li naskiĝis en la momento kiam ĝi komencas vivi libere kaj kiam ĝi necesas ĉiun forton.

Ke mi tuj transiru al la temo. Bosnio estas belega lando, neniel ordinara lando, nek laŭ sia naturo, nek lau siaj homoj. Kaj kiel sub la tero en Bosnio troviĝas minajaj trezoroj, samtiel la bosnia homo sendube kaŝas en si multan moralan valoron kun ĉe liaj samnacionoj en aliaj sudslavaj landoj malpli ofte troviĝas. Sed vidu, ekzistas io kion la homoj el Bosnio, almenaŭ la viaspecaj personoj, devus rekoni, por neniam perdi el vido: Bosnio estas lando de malamo kaj timo. Sed ni neglektu la timon kiu estas nur korelativo de tiu malamo, ĝia provizora eĥo, kaj parolu ni pri malamo. Jes, pri malamo. Ankaŭ vi instinkte ekstremas kaj protestas kiam vi aŭdis tiun vortojn (mi vidis tiom dum la nokto sur la stacio) samkiel ĉiu el vi kontraŭ staras aŭdi, percepti kaj rekoni tion. Se temas ĝuste pri tio ke oni devus tion ekvidi, konstati, analizi. Kaj malfeliĉo estas en tio ke neniu volas kaj povas fari ĝin. Ĉar la fatala karakterizo de tiu malamo estas ĝuste en tio ke la bosnia homo ne konscias pri la malamo kiu vivas en li, ke li malinklinas al ties analizado kaj – antipatias ĉiun kiu provas fari tion. Sed tamen estas fakto: ke en Bosnio kaj Hercegovino estas pli da homoj kiuj pretas en kuratakoj de senkonscia malamo, pro variaj motivoj kaj kun diversaj pretekstoj, mortigi



aŭ esti mortigitaj, ol en aliaj laŭ loĝantaro kaj amplekso multe pli grandaj slavaj aŭ neslavaj landoj.

Mi scia ke la malamo, samkiel kolero, havas sian funkcion en la socio, ĉar malamo donas forton, kaj kolero provokas movon. Ekzistas nalnovaĵojn kaj profunde enradikiĝintaj maljustecoj kaj misuzoj kiuj nur per torentoj de malamo eblas elradikiĝi kaj malundiĝi. Kaj kiam tiuj torentoj malŝveliĝas kaj malaperas, postrestas loko por libereco, por kreado de pli bona vivo. La samtempuloj multe pli bone vidas la malamon kaj koleron, ĉar ili suferas en tio, sed la posteularo vidos nur la fruktojn de forto kaj movo. Bone mi tion scias. Sed tio kiun mi rigardis en Bosnio, tio estas io alia. Tio estas malamo, sed ne iu tia momento daŭre la socia evoluo kaj nepra parto de iu historia procezo, sed malamo kiu aperadas kiel memstara forto, kiu en si mem trovas sian sencon. Malamo kiu levadas homon kontraŭ homo kaj poste egalmaniere ĵetadas en mizeron kaj malfeliĉon aŭ peladas subteren ambaŭ kontraŭulojn; malamo kiu simile al kancero en organismo konsumadas kaj formanĝegas ĉion ĉirkaŭ si, por ke finfine ĝi mem mortaĉu, ĉar tia malamo, kiel flamo, havas nek konstantan aspekton, nek propran vivon; ĝi simple estas ilo de impulso celanta nenigi kaj neniĝi, ekzistas nur kiel tia, kaj nur ĝis tiu tempo kiam ĝi plenumos sian taskon de kompleta nenigo.

Jes, Bosnio estas lando de malamo. Tio estas Bosnio. Kaj laŭ iu stranga kontrasto, kiu fakte ne estas tiel stranga, kaj eble oni povus ĝin per pli atentema analizo facile klarigi, oni povas ankaŭ diri ke estas malmulte da landoj en kiuj enas tiom da firma kredo, sublima fortikeco de karaktero, tiom da delikateco kaj amfervoro, tioma profundeco de sentoj, sindoneco kaj neŝancelebla fideleco, tioma da soifo al justeco. Sed sub ĉio tio kaŝiĝas en netravedeblaj profundoj tempestoj de malamo, tutaj uraganoj de implikitaj, kunpremitaj malamoj kiuj maturiĝas kaj atendas sian momenton. Inter viaj amoj kaj viaj malamoj la rilato estas sama kiel inter viaj altaj montoj kaj milfoje pli grandaj kaj pli pezaj nevideblaj geologiaj tavoloj, sur kiu ili kuŝas. Kaj tiel vi estas kondamnitaj vivi, sur profundaj sedimentoj de eksplodilo kiu de tempo al tempo ekbruliĝas ĝuste per fajreroj de tiuj viaj amoj kaj via arda, malbenita sentemo. Eble via plej granda malfeliĉo estas ĝuste en tio ke vi eĉ ne konjektas kiom da malamo enas en viaj amoj kaj emociegoj, tradicioj kaj piecoj. Kaj samkiel la tero sur kio ni vivas trairas, sub influo de la atmosfera malsekeco kaj varmo, en niajn korpojn, sonante al ili koloron kaj aspekton, difinante la karakteron kaj direkton al nia vivmaniero, kaj al niaj agmanieroj – samtiel la potenca subtera kaj nevidebla malamo sur kiu vivas la bosnia homo eniras nerimarkinte kaj ĉirkaŭire en ĉiujn liajn agojn. Malvirtoj naskas ĉie en la mondo malamon ĉar ili konsumadas kaj ne kreas, detruadas ne konstruadas, sed en landoj kia estas Bosnio – eĉ virtoj parolas kaj agas ofte per malamo. Ĉe vi la asketoj ne eltiras amon el sia asketeco, sed la

amon kontraŭ la voluptemaj; la abstinenculoj malamas tiuj kiuj driskas kaj ĉe la drinkemuloj aperigas mortiga malamo kontraŭ la tuta mondo. Tiuj kiuj kredas kaj amas, morte malamas tiuj kiuj ne kredas aŭ tiujn kiuj alimaniere kredas kaj amas ion alian. Kaj, ofre, bedaŭrinde, la plej granda parto de ilia kredo kaj ilia amo konsumiĝas en tiu malamo. (Pli multe da malbonaj kaj sombraj vizaĝoj ĉirkaŭ preĝejoj, monaĥejoj kaj moskeoj.) Tiuj kiuj subpremas kaj ekspluatas la ekonomike pli malfortajn, enmetas en tion, ankaŭ malamon, kiu tiun ekspluatadon faras centfoje pli malfacilan kaj malbelan, kaj tiuj kiuj suportas tiujn maljustecojn, sopiras al justeco kaj revenĝo, sed kiel al iu fenĝema eksplodo kiu se ĝi realiĝus laŭ ilia koncepto devus esti tia kaj tiom granda, ke ĝi krevigus eĉ la subpremiton kun la abomeno subpremanto. La plimulto de vi estas alkutimiĝinta meti la tutan forton de la malamo sur tio kio estas proksime al vi. Viaj amataj sanktaĵoj estas regule malantaŭ tricent riveroj kaj montoj, sed la objektoj de via abomeno kaj malamo estas ĉi tie apud vi, en la sama urbo, ofte sur la alia flanko de via kortomuro. Tiel via amo ne postulas multe da ago. sed via malamo tre facile trairas al ago. Kaj vian propran landon vi amas, arde amas, sed laŭ tri-kvar diversaj manieroj kiuj ekskludas mortige malamas unu la alian kaj ofte kolizias.

Iu rakonto de Mopasan enhavas Dionizian priskribon de printempo kiu finiĝis per la vortoj ke dum tiaj tagoj oni devus sur ĉiuj anguloj surglui afiŝojn: "Civitano franca, estas printempo, gardu vin de amo!" Oni eble devus ankaŭ en Bosnio admoni la homojn, ke ili sur ĉiu paŝo, en ĉiu penso, kaj en ĉiu, eĉ la plej sublima, sento gardu sin de malamo, de kunnaskita, senkonscia, endemia malamo. Ĉar en tiu necivilizita kaj povra lando, en kiu vivas densigute kvar diversaj religioj, estus necese, kvar foje pli da amo, reciproka kompreno kaj toleremo ol aliaj landoj. Sed en Bosnio male estas malkompreno, kiu de tempo al tempo transformiĝas al nekovrita malamo, preskaŭ la ĝenerala karakterizo de la loĝantoj. Inter la diversaj religioj la ravinoj estas tiel profundaj, ke nur malamo sukcesas foje trairi ilin. Mi scias ke oni povas al tio respondi min, eĉ sufiĉe pravante, ke tiurilate rimarkeblas certa progreso ke la ideoj de la 19-a jarcento ankaŭ tie havis efekton, kaj ke nun, post la liberiĝo kaj unuiĝo ĉio iros pli bone kaj pli rapide. Mi timas ke ne estas tute tiel. (Ŝajnas al mi ke mi dum tiuj kelkaj monatoj bone vidis la reciprokajn rilatojn inter diversreligiaj kaj diversnaciaj homoj en Sarajevo!) Oni presigos kaj parolos ĉie kaj en ĉiuj okazoj: "Frato karas, kiun ajn religion li havas", aŭ "Oni ne demandas kiel iu religio krucisignas sed kies sango hejtas lian bruston", "Fremdan respektu pri via fieru", "La integra popola unueco konas nek religiajn nek tribajn diferencojn". Sed en la bosniaj burĝaj rondoj de ĉiam estis malsincera burĝa ĝentileco, saĝa trompado sin mem kaj aliulojn per sonoraj vortoj kaj vana ceremoniaro. Tio vualadas kiel-tiel la malamon, sed ne forigas ĝin kaj ne

malhelpas ĝian kreskadon. Mi timas ke eĉ sub la kovrilo de ĉiuj nuntempaj maksimumoj povas en tiuj rondoj dormeti la praaj kainaj planoj, kaj ke ili vivos ĝis kiam, ne estos komplete ŝanĝitaj la fundamentoj de la materia kaj spirita vivo en Bosnio. Kaj kiam alvenos tiu tempo kaj kiu havos forton efektigi tion? Iun tagon ĝi venos, mi kredas tion, sed tio kion mi vidis en Bosnio ne indikas ke oni sekvas tiun vojon jam nun. Kontraŭe.

Mi pripensis tion, precipe la lastajn monatojn, kiam mi ankoraŭ luktis kontraŭ la ideo forlasi Bosnion por ĉiam. Estas kompreneble ke ne dormas bone la homo kiun premegas tiaj pensoj. Kaj mi kuŝantis apud la malfermita fenestro, en la ĉambro kie mi naskiĝis, fore muĝis la Miljacka alterne kun la fruaŭtuna vindo en la ankoraŭ abunda foliaro.

Kiu en Sarajevo pasigas la nokton maldorma en lito, tiu povas aŭdi strangajn sonojn de la sarajeva nokto. Peze kaj sekure batas la horloĝo sur la katolika katedralo – du post meznokto. Pasas pli ol unu minuto (ekzakte sepdek kaj kvin sekundoj, mi nombris) kaj nur tiam anonciĝas per iomete malpli forta sed penetrema sono la horloĝo de sur la ortodoksa preĝejo, ankaŭ ĝi batas sian duan horon post meznokto. Malmulte post ĝi ekbatas raŭkavoĉe, foravoĉe la horloĝturo ĉe la Beja moskeo, kaj ĝi batas la dekunuon horon, fantomajn dekunu turkajn horojn, laŭ la stranga kalkulado de foraj, fremdaj regionoj de la mondo! Judoj ne havas batantan horloĝon, sed l' unika Dio scias kioma horo estas ĉe ili, kioma laŭ la sefarda kaj kioma laŭ la eŝkenara kalkulado. Tiel eĉ nokte, dum oni dormas, en la nombrado de nuraj horoj dum muta tempo maldormas la diferenco kiu dividas tiujn dormemajn homojn kiuj maldormaj ĝojas kaj malĝojas, regaliĝas kaj fastas laŭ kvar diversaj, inter si malpaciĝintaj kalendaroj kaj ĉiujn siajn dezirojn kaj preĝojn ili sendas al unu ĉielo en kvar diversaj ekleziaj lingvoj. Kaj tiu diferenco estas, foje videble kaj malfermite, foje nevideble kaj kaŝemallice, ĉiam simila al malamo, ofte tute identa kin ĝi.

Tiu specia, bosnia malamo devus esti pristudita kaj repuŝita kiel malbonega kaj profunde enradikiĝinta malsano. Kaj mi kredas ke fremdaj scienculoj estus venintaj en Bosnio por pristudi malamon, samkiel ili pristudadas la lepron, nur se la malamo estus rekonita, apartigita kaj klasifikita studobjekto, kiel la lepro.

Venis al mi ideo ke ankaŭ mi mem min ĵetu sur la pristudadon de tiu malamo, kaj ke analizante kaj konatigante ĝin mi kontribuu al la neniigo de tio, Eble tio eĉ estis mia devo, ĉar mi kvankam fremddevena, en tiu lando, kiel oni diras, ekvidis "la lumon de la tago", Sed post la unuaj provoj kaj pli longa pripensado mi rekonis ke mi havas nek kapablon nek forton por tio. Oni postulus de mi, samkiel de ĉiuj aliaj, ke mi determiniĝu, ke mi estu malamata kaj ke mi malamam. Sed mi tion ne

volis kaj ne scipovis. Eble mi, se tiel devas esti, eĉ estus konsentita deveni viktimo de malamo, sed vivi en malamo, partopreni en ĝi, tion mi ne povas. Kaj en la lando kiel estas la nuna Bosnio, tiu kiu ne pobas, aŭ kiu estas ankotraŭ pli malbone kaj pli grave, kiu konscie ne volas malami, ĉiam estas iomete fremdulo kaj renegato, kaj ofte ankaŭ martiro. Tio validas ankaŭ por vi, denaskaj bosnianoj, kaj des pli por iu almigrinto. – Kaj tiel mi dum unu el tiaj aŭtunaj noktoj, aŭskultante la strangajn alvokadojn de tiuj variaj kaj diverssonaj sarajevaj turoj, konkludis ke mi ne povas resti en mia la dua patrolando Bosnio, ke mi ne devas resti en ĝi. Mi ne estas tiom naiva por ke mi serĉu en la mondo urbon en kiu ne estas malamo. Ne, mi bezonas nur lokon en kiu mi povos vivi kaj labori. Ĉi tie mi ne povus tion.

Vi kun mokrido, eble eĉ kun malestimo ripetos vian vorton pri mia fuĝo el Bosnio. Ĉi tiu mia letero ne havas forton por klarigi kaj pravigi al vi mian agmanieron, sed ŝajnas ke en la vivo ekzistas okazoj kiom validas la antikva latina regulo: Non est salus nisi in fuĝa (Savo estas nur en fuĝo). Kaj mi petas vin kredi nur tiom: ke mi fuĝas de mia humana tasko, sed pro tio ke mi ne povus ĝin plenumi komplete kaj senĝene.

Al Vi kaj al nia Bosnio mi deziras en la nova popola kaj ŝtata vivo ĉian feliĉon!

Via M. L.

Pasis deko da jaroj. Mi malofte rememoris mian amikon el infanaĝo, kaj mi lin estis tute forgesinta, se la fundamenta penso de lia letero de tempo al tempo ne estus rememorinta lin. Proksimume ĉirkaŭ la jaro 1930 mi eksciis tute hazarde ke doktor Maks Levenfeld restis en Parizo, ke li antaŭ urbo Neĵi havas disvastigitan praktikon, kaj ke en nia kolonio kaj inter la jugoslavaj laboristoj li estis konata kiel "nia doktoro" kiu senpage ekzamenadas la laboristojn kaj studentojn, kaj, se necesas, li mem havigas al ili medikamentojn.

Pasis denove sep-ok jaroj. Iun tagon, denove hazarde mi eksciis la pluan sorton de tiu mia kamarado. Kiam en Hispanio komencis la civila milito, li forlasis ĉion kaj foriris kiel libervolulo en la republikan armeon. Li organizis ambulancojn kaj hospitalojn, famiĝis laŭ sia fervoro kaj scio. Komence de la jaro 1938 li troviĝis en iu malgranda aragonia urbo kies nomon neniu el niaj homoj povis korekte elparoli. Sur lian hospitalon estis farita aeratako dum hela tago kaj li pereis ope kun preskaŭ ĉiuj liaj vunditoj.

Tiel finis sian vivon la homo kiu forfuĝis antaŭ la malamo.

Tradukis Agnesa Eremija

# Jubileo

## PAJA JOVANOVIĆ OKAZE DE 150 JAROJ DE NASKIĜO

Paja Jovanović estas unu el la plej rimarkindaj pentristoj ĉe la fino de la 19-a, respektive la 20-a jarcento, inter serboj, kun respekto de lia internacia renomeo. Li okupas la pintan lokon en la historio de la serba kaj monda pentroarto. En kadro de realismo, estas certe kaj konsekvence ke Paja Jovanović kaj Uroš Predić estas la plej meritaj artistoj kiel eminentaj reprezentantoj de l'akademia varianto en serba pentroarto.

La verkaro de Paja Jovanović estas granda – li vivis preskaŭ la tutan jarcenton (1859-1957). Pentrante aĵojn tiajn kiajn ili estas li proksimiĝis al nia popolo pli ol tion faris aliaj serbaj pentristoj. Liaj verkoj estas interesaj ankaŭ hodiaŭ, taksante laŭ populeco de iuj specoj aŭ kompozicioj kiuj, kvankam faritaj antaŭ pli ol unu jarcento, perdis nenion de sia aktualeco.

Li naskiĝis la 4-an de junio 1859 en Vršac en familio de fotografisto. La unuajn nociojn pri pentrado li ricevis de Vodecki, pentristo el Vršac. Kiel stipendiisto de Matica srpska studis en Vieno, en la Universitata akademio ĉe prof. Leopold Karl Müller, tiam konata pentristo de pejzaĝoj kaj specoj. Ankoraŭ kiel lernanto li pentris la verkon *Vundita montenegrano*. Per ĝi kaj *Guzlisto P. Jovanović* heroigis nian ĝistiaman specon, kiu en serba pentroarto, kiel memstara arta temo, apenaŭ ekzistis. Siajn temoj li ĉerpis dum siaj multnombraj vojaĝoj en preskaŭ ĉiuj partoj de Balkano, senlace kolektanta skizojn. En la 19-a jarcento li faris multajn tre bone konatajn pentraĵojn kun scenoj el Serbio, Hercegovino, Montenegro kaj Albanio: *Ludo per glavoj*, *Sangvenĝo el Kuĉa*, *Perfidulo*, *Albana gardo*, *Patro instruas filon je skermado*, *Reveno de montenegrano el roto*, *Rakontoj pri Kosova batalo*, *Batalo de virkoko*, *Ornamado de junedzino*, pentrante ĉefe laŭ kontraktoj kun la komercistoj de pentraĵoj el Londono.

Post restado en Parizo kaj Munĥeno, en periodo 1884-95, Paja revenas al Vieno. Ĉi tie 1895 li akceptas mendon de la serba patriarko Georgije Branković kaj por Ekspozicio de Budapeŝto pentris la verkon *Migrado de serboj* sub gvidado de Arsenije III Crnojević. Por la Monda ekspozicio en Parizo 1900 laŭ mendo de Serbia ŝtato li pentris *Proklamado de leĝaro de Duŝan*. Pli poste Jovanović faris dekorativajn historiajn pentraĵojn: *Sankta Sava kronigas Prvovenĉani-n*, *La edziĝfestoj de Duŝan*, *Forbruligado de postrestaĵoj de Sankta Sava*.

De sia komenca laborperiodo Paja verkas portretojn, sed pli ofte de 1906. Sur ĉi tiu kampo oni povas vidi liajn ĉefajn pentristajn valorojn: brila desegnaĵo, facileco de figurstarigo kaj senco por dekoreco. Tiel

ekestis la tuta galerio de portretoj kaj Jovanović rapide fariĝis tre serĉata pentristo de eŭropa aristokrataro. Dejan Medaković skribis ke Paja Jovanović en serba pentroarto de realismo atignis la plaj altan pinton.

Unu el la plej belaj libroj ĉe la lasta Beograda foiro de libroj estis luksa monografio „Paja Jovanović“ je tri lingvoj: serba, angla kaj germana.

La redaktanto de ĉi tiu verko estas Momčilo Moša Todorović. Aŭtoroj de teksto en la monografio estas Nikola Kusovac, Dejan Medaković, Đorđe Kadijević kaj ankoraŭ kelkaj bonaj konantoj de pentroarto. En la libro estas substrekitaj tri artfazoj de la fama pentristo: majstro de pentraĵspeco, de monumentaj historiaj kompozicioj kaj de portretisto. La plej multa nombro de gravaj pentraĵoj estas disŝutitaj en muzeojn kaj opajn kolektojn tra la tuta mondo – de Eŭropo ĝis Norda kaj Suda Ameriko ĝis Japanio. En multaj domoj verkoj de Jovanović havas familian statuson preskaŭ kultan.

En kompleta disproporcio estas graveco kaj arta grandeco de Paja Jovanović kun nombro de verkoj dediĉitaj al li. Oni atendas aperon de iu scienca studaĵo flanke de la nuntempa kritik-teoria kaj historia konscioj kiu donos pli kompletan portreton de ĉi tiu pentristo „de eŭropa nivelo kaj voĉo“, kiel tion karakterizis Pavle Vasić. Ankoraŭ dum la artista vivo, tiun post la Dua mondmilito, la pentristo estis je „celobjekto“ de ideologiaj arbitroj, kontraŭ kvazaŭ „malnova“ kaj „transpaŝita“ artaĵo.

Nepre oni devas korekti majuston kontraŭ la artisto, antaŭ kies verkoj plej ofte kaj plej longe oni haltadas en la mondaj kaj landaj muzeoj. Nia bone konata teatra, filma kaj TV reĝisorino Soja Jovanović (fratino de aŭtoro de ĉi tiuj vicoj, iliaj avoj estis fratoj) ofte parolis ankaŭ ĉe televido pri frato de ŝia avo, Milan Jovanović, beograda arta kaj kortega fotografisto. Ankaŭ persone iu el la plej grandaj nomoj de serbaj kaj jugoslaviaj artistoj ŝi estis tre fiera pro grandeco de Paja Jovanović, pli multe ol pri la familio flanke de ŝia patrino, de ŝia dua avo inĝ. Petar kaj praavo Arandjel Ilić vicepiskopo (1820-1902), kies „Aŭtobiografio“-n oni povas legi ne nur nacilingve, sed ankaŭ en Esperanto.

En Beogrado troviĝas Muzeo de Paja Jovanović, strato de Kralj Milan 21 (tel. 3340-176), sur la kvara etaĝo en iama luksa kvinĉambra loĝejo. En ĝi oni povas vidi aŭtentikajn ĉiutagajn objektojn kaj aĵojn de la fama pentristo kaj multajn aliajn artajn objektojn. Esperantistoj el Beogrado, kaj el la tuta Serbio okaze de la venonta E-kongreso 2010 en Beogrado, povus kolektive viziti la Muzeon kaj ĝui belecon de pentroarto.

d-ro Pribislav Marinković

(LITERATURO:

Enciklopedija Jugoslavije (4), 1960;

100 godina srpske umetnosti (1850-1950), Beograd, 2009;

„Politika“, novembar 2009).

# Aktualaĵoj

## LA VIZO

Estis la jaro 2004?. Mi ricevis invitilon por gvidi kurson dum tradicia Somera kursaro en Aŭstralio, Melborno. Mi ĝojis pro tiu invito ĉar mi ankoraŭ ne estis en Aŭstralio. Mi iris al Ambassadejo pro la vizo. Tie estas ĉio bone organizita. Sur la muro estas aparato el kiu oni eltiras ordan numeron kaj poste en salono kie estas la giĉetoj vi povas trankvile sidi ĝis kiam super la giĉeto aperas via numero, tio signifas ke via afero estos traktota. Intertempe vi plenigas la demandliston kiu estas en angla lingvo. Apud mi sidis homo tre strange vestita en sandalo kun ege malnovmoda leda teko. Li interparolis kun virino sidanta apud li. Li fanfanoras ke jam 30 jaroj li vivas en Aŭstralio kaj nun venis rekonstrui la malnovan domon en sia vilaĝo. La virino petis lin ke plenigu al ŝi la demandliston ĉar ŝi ne komprenas la anglan. Li respondis

- Ho,. Mi ne scias skribi en angla, nek povas plenigi la demandilon ĉar mi ne povas ĉion kompreni. Tiam mi enmiksigis demandante:

- Ĉu eblas ke dum 30-jara vivo en Aŭstralio vi povas nek skribi, nek legi, eĉ ne ĉion kompreni en angla?

- Jes, eblas, mi laboras en fabriko kie mi sidas ĉe maŝino, kiu faras najlojn. Estas granda bruo en tiu loko kaj la kunlaborantoj ne povas interparoli. Poste kiam finiĝas la labortempo, mi havas aŭton kaj iras rekte hejmen, ekster la urbo, ĉar mi la aŭton ne kondukas tra la urbo. Ĉu vi ankaŭ vojaĝas al Aŭstralio?,- turniĝis al mi.

- Jes, mi gvidos tie kurson de Esperanto kaj restos dum 2 semajnoj.

- Ho, kara ne revenu, mi tuj povas ĉi tie en ambassadejo subskribi al vi garantian leteron, ke mi prizorgos vin, kaj vi poste venu al mi, estu mia edzino. Mi ne estas ege postulema, mi estus kontenta nur se vi ĉiutage atendos min kun io manĝebla per kulero. Mi ŝatas la kuiritajn manĝaĵojn. Vi nenion devas labori, vi estos en domo, mi iros al laborejo kaj post reveno ni pasigos la vesperojn kune.

Mi estis vere ŝokita! Tamen afable mi trankviligis lin, ke mi tion ne povos fari,

- Sed eble tion vi proponu al sinjorino apud vi

- Ne, ŝi ne scipovas la anglan.

Do, anstataŭ ricevi la vizon mi ricevis bonan okazon edziniĝi eĉ al eksterlandano! Kia ŝanco!

En tiu ŝoko mi ekvidis mian numeron ĉe giĉeto kaj alkurante ĝin, tute ne sciis kion diri. Mi montris miajn paperoj kaj la invitleteron kaj ili ĝentile diris ke mi venu venontsemajne., Mi rehejmiĝis kaj tiam denove legis miajn dokumentojn kaj konstatis ke mi devas esti en Aŭstralio post 8 tagoj. Mi tiam vidis ke tio tute ne eblas ĉar mi ne povos Melbornon atingi ĝustatempe se mi devos atendi plian semajnon pro la vizo. Mi skribis al Aŭstralia Esperanto Ligo, ke bedaŭrinde mi ne povos esti ĝustatempe tie pro la vizo. Kaj la mirakla komputilo! Samvespere mi ricevis mesaĝon ke mi morgaŭ iru al ambasadejo kaj estas ĉio en ordo. Kiel tio eblas? Ĉar la prezidanto de AEL estas eksa Ministro por Eksteraj rilatoj en UN-o Ralph Harry.

Tuj matene mi iris tien, sed ili nenion sciis pri mia vizo. Nature mi aliris la saman giĉeton kie hieraŭ mi estis. Mi ekŝvitis. Tamen, mi ne sukcesos! Tute hazarde aŭdis mian nomon la juna oficisto de apuda giĉeto. Li alvokis min kaj donis al mi la pasporton kun la vizo kaj eĉ diris ke mi ne devas pagi la vizon (kiu kostis 100\$)

Mi do, denove ankaŭ kun ŝoko eliris el ambasadejo. Hejme mi malfermis la pasporton kaj konstatis ke mi ricevis OFICIALAN VIZON por oficiala vojaĝo. Mi ne povis kredi. Mi jam estis en multaj landoj sed tio ankoraŭ ne okazis. Poste mi informis AEL ke mi ricevis la vizon ,kaj ke la flugbileto kostas ĉ. 1000\$. Ili tute leĝere respondis:

-Vi pagu kaj ni repagos ĉi tie la sumon al vi.

Ho, Dio, de kie mi povus havi 1000\$ en tiu krizo, kiel emeritulo kun 80\$

Denove la komputilo estis la sola helpilo, mi skribis al ili:

- Kvankam nun mi la vizon havas, la monon por la flugbileto mi absolute ne havas, nek konas iun ajn, kiu povus pruntedoni al mi. Tiu alta sumo estis, neimageble en tiu periodo ĉe ni.

Post unu tago mi ricevis telegramon ke mi iru al banko, ĉar alvenis pere de Wester Union mono al mi. Mi ne kredis ke tio eblas. De poŝto mi rekte iris al avioagentejo kaj aĉetis la bileton, kaj post 2 tagojn mi forflugis al longega vojaĝo, al alia flanko de la mondo

Kiam mi alteriĝis en Melburno mi timegis ke tiu mia vizo de *oficiala vojaĝo* ne estu suspektinda. Sed por oficialaj vizitoj ekzistis tute alia eliro kaj neniu rigardas min nur, stampis la pasporton kaj salutis min. Tamen kiam mi atendis mian valizon, alvenis vere eta hundo kaj flaregis mian mansakon. Post ĝi alvenis sinjorino kaj petis ke mi malfermu la pakajon. La hundeto sursaltis kaj komencis per antaŭaj piedoj ĉion elfosadi ĝis



kiam li trovis paperan sakon kun duon kilogramo da sekaj figoj. La sinjorino montris al mi la informilon kiun oni enmetis en pasporton ĉe nia flughaveno. Estas klara indiko ke neniun manĝaĵon kaj lignajn objektojn, semojn ktp. oni ne rajtas en porti. Ŝi montris al mi la klaŭzulon kie estas indikita la punsumo kiun oni devas pagi se etas trovita io malpersita ĉe la vojaĝanto. Ŝi petis mian pasporton kaj kiam vidis la vizon por oficiala vojaĝo, ŝi kun agrabla rideto redonis la pasporton, forprenis la figojn, kaj forgesis pri la puno. Ĉe la flughaveno atendis min s-ro Kanaĉki, serbo, kiu vivas tie jam pli ol 50 jarojn. Li estas kunlaboranto en radioelsendo 3ZZZ kiuj elsendadas en Esperanto. Tio estis agrabla surprizo. En kursejo mi persone konatiĝis kun s-ro Ralph Harry. Tre agrabla homo, mi dankis lian intervenon ĉar sen tio mi tute ne povus veni.

Hodiaŭ la 19an de decembro estas la tago kiam Serbio akiris la servizan liberigon. Do, mi ĝojegas kaj ne plu havos okazon havi oficialan vizon.

PS: Mi havas kelkajn pasportojn plenplenajn de vizoj, ĉar ni devis havi ne nur vizon por la vizitota lando sed ankaŭ transirajn vizojn tra aliaj landoj. Mi preskaŭ ne kredas ke tiu longega vicstaro kaj ĉiama timo ke eble oni ne ricevos la vizon, pasis.

Tereza Kapista

# Esperanto-kurso

Бориша Милићевић

**Акузатив правца означава, као и код нас, кретање у (на) неко место или простор односно просторију. Пример:**

- Kie vi estis hodiaŭ?
- Где си био (или била) данас? Где сте били данас?

**Са акузативом правца:**

- Kien vi iras nun? -Куда идеш сада? Куда идете сада?
- Mi volas iri en la societejon. - Хоћу ићи (или да идем) у просторију Друштва.

**Ево још примера акузатива правца:**

- Mi ankaŭ iras tien?- И ја идем тамо. (Ја такође идем тамо)
- Metu la libron en mian mansakon? - Стави (или ставите) књигу у моју торбу.

**Треба да напоменемо да уз предлог al не *ige* акузатив правца, јер сам предлог означава правац.**

**Ни уз предлоге je и ĝis не *ige* акузатив правца.**

∴

**Погодбени начин се гради додавањем наставка -US за сва лица једине и множине. За разлику од нашег, погодбени начин у есперанту није сложени глаголски облик.**

vojaĝi	- путовати	mi vojaĝus	- ја бих путовао(ла) или путовао(ла) бих
rakonti	- причати	ŝi rakontus	- она би причала или причала би
postuli	- захтевати	ili postulus	- они (оне) би захтевали(е) или захтевали би

**Примери:**

- Se vi alportus mian libron ĝis la sepa horo, mi povus ellerni poemon parkere.
- Ако би ти донео (или бисте ви донели) моју књигу до седам сати, ја бих могао научити (или да научим) песму напамет.
- Ni volonte vojaĝus se la vetero estus bela.

- Ми бисмо радо путовали, ако би време било лепо.

После свезе kvazaŭ (као да) *увек иде* погодбени начин.

- Ili ŝin amas kvazaŭ ŝi estus ilia filino.

- Они је воле као да је она њихова кћи.

- Li staras tie kvazaŭ li volus reciti.

- Он стоји тамо као да хоће рецитовати (или да рецитује).

### *Konversacioj*

kie	-где	tie	-ту, тамо, онамо
tie ĉi или ĉi tie	-овде	frue	-рано
veturi	-возити се	por	-за; да (би)
pentri	-сликати	desegni	-цртати
arto	-уметност	post	-након, после, иза
hejmo	-дом, огњиште	sur	-на, по
teni	-држати	reteni	-задржати
vojo	-пут, друм	vero	-истина
preni	-узети	diligenta	-марљив, а, о
korto	-двориште	aĉeti	-купити
loko	-место	kulturi	-гајити (биљку)
bildo	-слика	jam	-већ
iu	-неко; неки, а, о	neniu	-нико; ниједан, а, о
tra	-кроз, по; про- или пре- (+глагол)		

-Kara samideano, kien vi ekiris tiel frue?

-Mi veturos hodiaŭ al Beogrado por vidi unu ekspozicion de pentraĵoj kaj desegnaĵoj.

-Pri kio temas?

-Temas pri portretoj de niaj artistoj. Tio estas tre interesa. Post ĝia trarigardo mi revenos hejmen.

-Bone, ni revidos nin. Ni povos iri kune en restoracion por vespermanĝi.

-Kelnero, mi petas du porkaĵojn kaj tomat-salatojn.

-Bonvolu manĝaĵojn.

-Dankon, sed mi ne havas salujon. Ĉu vi alportos ĝin al mi.

-Certe, tuj mi revenos.

-Jen la salujo.

-Vi estas vere diligenta.

-Bonan apetiton!

-Dankon, same.

-La manĝaĵo estis tre bona. Nun ni povas trinki kafon.

-Mi volonte prenos fruktojn, ekzemple pomojn.

-Jen la pomujo, bonvolu.

-Mi havas en la korto unu pomarbon, kiu estas tre fruktodona kaj mi ne aĉetas pomojn.

-Mia loĝejo estas sen korto kaj mi ne povas kulturi fruktarbojn.

-Estas jam tempo ekiri. Ni povus trairi la urbcentron por aĉeti bildkartojn.

-Bone.

### *Proverboj*

Neniu scias ĉion.

– **Нико не зна све.**

Neniu rozo sen dorno.

– **(Ниједна ружа без трна). Нема руже без трна.**

∴

Zamenhof mortis je la dek-kvara de aprilo 1917.

Zamenhof mortis la dek-kvaran de aprilo 1917.

**Заменхоф је умро четрнаестог априла 1917.**

Mi revenis je la oka de novembro.

Mi revenis la okan de novembro.

**Вратио сам се осмог новембра.**

Ili restis tie dum du tagoj.

Ili restis tie du tagojn.

**Они су остали тамо два дана.**

Ĉu vi venos en ĵajdo?

Ĉu vi venos ĵajdon?

**Да ли ћеш (или ћете) доћи у четвртак?**

*Напомена:* Акузатив употребљавамо ако се ради о једном одређеном дану, овде четвртку.

Ако се пак радња дешава редовно тим даном, онда у есперанту употребљавамо прилошки облик.

Ni havas instruhorojn de Esperanto ĵajde.

**Ми имамо часове есперанта четвртком.**

∴

(наставиће се)

# Informoj

En teatro "Joakim Vujiĉ" en Kragujevac  
**HISTORIA TEATRA OKAZAĴO**

Pasintsemajne en la teatro "Joakim Vujiĉ" en urbo Kragujevac" okazis por Serbia Esperanto-movado – historia okazaĵo: la unua profesia teatra spektaklo en lingvo Esperanto.

Aktoris la skipo internacia (profesia teatra Sceno Shelter): Saša Pilipoviĉ (Aleksandar Postnikov), aktoro de kragujevaca teatro, Miĉo Vrhovac (L. L. Zamenhof), esperantisto el Banja Luka (BiH) kaj Ljubica Gašpareviĉ (Lidija), ankaŭ aktorino de kragujevaca teatro "Joakim Vujiĉ". Enscenigisto estis Miliĉ Jovanoviĉ, membro de grupo Shelter Sceno.

Teatra salonego estis plena. Organizantoj preparis simltanan tradukaĵon por neesperantistoj. Spektaklo estis parto de solena fina vespero de Internacia festivalo de malgrandaj scenoj kie partoprenas teatroj el Serbio, Britio, Romanio, Usono, Italio kaj Makedonio.

Al teatra spektaklo, la unua profesia spektaklo en Esperanto lingvo en Serbio, krome civitanoj de Kragujevac kaj partoprenantoj de festivalo el aliaj landoj, ĉeestis beogradaj kaj kragujevacaj esperantistoj.

D. Janiĉić

## JARKUNVENO DE SEL

En Niš la 12-an de decembro okazis jarkunveno de SEL. La jarkunvenon ĉeestis delegitoj el 6 societoj, kiuj pagis kotizon al SEL. Ĉeestis ankaŭ membroj de iuj aliaj societoj, sed ili ne havis voĉdonrajton. La prezidanto Mile Nikoliĉ tralegis la raporton de la estraro kaj la kasistino tralegis la financan raporton.

Post diskuto pri la raportoj oni ilin akceptis kaj daŭrigis per elekto de nova estraro. En novan estraron eniris Nikola Iliĉ el Jagodino, Radiša Milutinoviĉ el Jagodino, Momĉilo Krstić el Niš, Stanimir Živkoviĉ el Leskovac kaj Adem Jakupoviĉ el Beogrado.

Post la jarkunveno oni okazigis feston de 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, viziton al loka muzeo kaj kunan tagmanĝon.

Adem Jakupoviĉ

## DONACO DE LIBROJ DE S-INO BILJANA STANIĆ NOME DE ĤIA PATRO SLOBODAN

Sinjorino Biljana Stanić el Novi Sad (nun Sremski Karlovci) donace donis al mi por E-Instituto du nilon-sakojn da E-libroj kaj revuoj (apartaj n-roj) de sia forpasinta patro Slobodan Runjajić. Ĉiu donacaĵo havas surkovrile la de li indikitan numeron, postkovrile lian subskribon kaj la stampsignon "Esperanto Lingvo internacia".

Slobodan Runjajić naskiĝis la 29.01.1933 en Ub, proksime de Valjevo. La infantempon li pasigis en Ub, kie li finis la porinstruistan lernejon. Oni

ne scias precize kiam li komencis lerni Esperanton, sed certe kiel junaĝa, ĉar li jam parolis kaj utiligis Esperanton en la porinstruista lernejo. Li instruadis la rusan lingvon en la porjunulina internulejo, poste en Lukavica, Bosnio, kaj poste en Beŝenovo, Sirmio. Poste, fininte la superan difektologan lernejon, li oficis kiel difektologo en la speciala lernejo en Sremska Mitrovica.


Kiel juna, li multe korespondadis en Esperanto, havis amikojn en la tuta mondo, interŝanĝadis librojn kaj bultenojn.

Post lia morto, s-ino Biljana Stanić transportis ĉiujn liajn Esperantajn librojn al Novi Sad kaj, jen, donacis ilin al nia E-Instituto.

Ni elkore dankas sinjorinon Stanić kaj klopodos disdividi tiujn librojn al niaj geesperantistoj en certaj okazoj estontaj en niaj E-societoj rilate al Esperanto.

Oktobro 2009.

Boriša Milićević



## **AGRABLA ESPERANTA VESPERO**

Laŭ iniciato de esperantistino Agnesa Eremija la Kultura virina sekcio de Juda komunumo en Beogrado (la 8an de novembro) organizis memorkunsidon omaĝe de la 150a naskiĝdatreveno de Lazaro Ludoviko Zamenhof kiu mem estis judo. Tio okazis en bela salono de Komunumo.

La kunsidon malfermis membrino de juda komunumo kiu menciis en nelonga parolado ankaŭ la Kontraŭfaŝistan memortagon kiam la 9an de novembro 1939 okazis la tielnomata "kristala nokto" kiu estis la unua klare videbla anticionista atako.

Pri inicianto de Esperanto parolis Tereza Kapista kiu en populara maniero iom priskribis Zamenhofon mem kaj konatigis la ĉeestantojn pri liaj originalaj verkoj kaj gravaj tradukoj per kiuj li montris kaj pruvis ke la lingvo estas vere konvena eĉ por tradukado de la plej konataj mondaj literaturaj perloj. Aparte parolis pri la organizado de Esperanto movado en Serbio. Citis ankaŭ kelkajn gravajn eldonaĵojn el serba literaturo kaj akcentis ke estis tradukitaj ankaŭ la verkoj de judaj nunaj modernaj aŭtoroj. Akcentis la gravan evoluon de lingvolernado pere de interreto kiu konvenas aparte al gejunuloj.

Poste venis la pli vigla parto kiam fratinoj Umbaja kaj Urmina Majstoroviĉ ludis kaj kantis kaj en serba kaj Esperanto. Ili uzis po 2-3 instrumentojn kaj vere tio estis eta koncerto, sed serioza kaj ege kvalifikita prezento de muzikado. Ni fiere anoncis ke ili mem estas esperantistoj. Poste venis la kukoj kaj teo, libera babilado kaj respondoj al kelkaj demandoj.

Estis agrabla kaj utila kunveno kaj amikiĝo. Apud tio, bela esperanta vespero kaj propagando de internacia lingvo.

D. Janičić



La 62-a kongreso de IFEF,  
Internacia Fervoja Esperanto-Federacio, okazos  
en Sofio (Bulgario)  
de la 8-a ĝis la 15-a de majo 2010

La 43-a konferenco de ILEI  
okazos en Matanzas (Kubo)  
en 2010 (de la 11-a ĝis la 17-a de julio)



La 3-a kongreso de serbiaj esperantistoj  
okazos en Beogrado (Serbio)  
de la 25-a ĝis la 27-a de junio 2010